

*Klaus Schubert*

*Universität Hildesheim, Germanio / Germany*

## Kiu estis la unua funkcianta planlingvo?

**Resumo:** La interlingvistoj ĝenerale konsentas, ke la unua planlingvo funkcianta en fakta komunikado estis Volapük. Lastatempe pluraj aŭtoroj tezis, ke la lingvo Solresol de Sudre aŭ la universala lingvo de Sotos Ochando funkciis pli frue. Plia tezo estas, ke la universala lingvo de Sotos Ochando eĉ atingis la statuson de semiplanlingvo. La artikolo koncize prezentas la tri lingvojn kaj esploras laŭ ĉiuj troveblaj fontoj, kiu la unua estis funkcianta planlingvo. Detala analizo de la historio de la du kandidataj planlingvoj montras, ke ne temas pri jesnea, sed pri grada demando. Kiel taŭgan mezurilon por tia malrapida, iompostioma evoluo de planlingvoj la artikolo uzas la skalon de Blanke, klopodante detekti por ĉiu ŝtupo de la skalo, ĉu aŭ kiugrade la koncerna lingvo ĝin atingis. Montriĝas, ke utilas apliki la skalon iomete alimaniere ol tion faris Blanke. Samtempe evidentiĝas, ke ioma sukceso de unu planlingvo preparas la grundon por socia akcepto kaj por la disvastiĝo de postaj planlingvoj.

**Ŝlosilvortoj:** Funkcianta planlingvo; Evoluo de planlingvo; Solresol; Sudre; Universala lingvo de Sotos Ochando; Volapük.

### 1 Funkcianta planlingvo

Esperanto estas la plej sukcesa planlingvo, sed ĝi ne estas la unua, kiu funkciis. Granda nombro da planlingvoj estis skizitaj, projektitaj kaj iuj eĉ elaboritaj ĝis alta grado de kompleteco, sen ke ili fakte funkciis en komunika uzo. En interlingvistiko oni ĝenerale konsentas, ke la unua planlingvo, kiu vere funkciis, estas Volapük, lanĉita en la jaro 1879. Tamen en diversaj lastatempaj publikaĵoj (kiujn mi referencas sube) aperas informoj, laŭ kiuj aliaj planlingvoj transiris la sojlon al fakta funkciado pli frue ol Volapük. Ĉi tie mi ŝatus pli detale studi tiun demandon. Estas mia espero, ke ĉi tiu malgranda esploro povu kontribui al pliklarigo de la historia disvolviĝo de planlingvoj antaŭirantaj Esperanton kaj tiel preparantaj la grundon por la rapida disvastiĝo, stabiliĝo kaj ekevoluo de Esperanto.

Ĉi tiu studo krom Volapük ĉefe koncernas du planlingvojn kaj tri tipojn de tezoj pri ili. La planlingvoj estas Solresol de Sudre kaj la universala lingvo de Sotos Ochando. La ekzamenindaj tezoj estas la jenaj:

- (1) La universala lingvo de Sotos Ochando estas la unua planlingvo, kiu atingis la statuson de semiplanlingvo.

- (2) Solresol estis la unua planlingvo, kiu havis parolantojn/uzantojn.
- (3) Solresol kaj la lingvo de Sotos Ochando havis adeptaron aŭ movadon.

En sekcioj 3.1, 3.2 kaj 3.3 mi pli detale prezentas la du planlingvojn kaj, por komparo, Volapukon. Tie mi ankaŭ detale referencas al la publikaĵoj enhavantaj la tri tezojn. Antaŭ tio en sekcio 2 mi klarigas kelkajn bazajn terminojn uzatajn en la diskuto. En la fina sekcio 4 mi klopodas trakti la demandon, kiu el ili do estis la unua funkcia planlingvo, alvenante al pesita respondo.

## 2 Bazaj terminoj

Por karakterizi la lingvojn diskutatajn ĉi tie mi uzas la terminojn *planlingvo*, *universala lingvo*, *filozofia lingvo*, *apriora lingvo* kaj *aposteriora lingvo*. Por esti preciza, mi koncize difinas ilin.

*Planlingvo*: Oni kutime difinas planlingvon kiel lingvon konscie kreitan de unuopa homo aŭ grupo de homoj por faciligi la internacian lingvan komunikadon (Blanke 1985, 53; Back 1996, 881; Stria 2016, 42).

*Universala lingvo*: Ankaŭ la universalaj lingvoj estas konscie kreitaj de homoj. Oni uzas la terminon ĉefe por sistemoj skizitaj aŭ ellaboritaj en Eŭropo inter la 17-a kaj la 19-a jarcentoj. Iuj aŭtoroj sekvis la celon per filozofiaj aŭ “logikaj” konsideroj ordigi kaj sistemigi ĉiujn aĵojn de la perceptebla kaj la imagebla mondo aŭ ĉiujn konceptojn de la homa penso (Strasser 1989, 207; Neis 2009, 804). Aliaj aŭtoroj celis krei lingvon por faciligi la komunikadon inter kleruloj – ĉu tutĝenerale, ĉu precipe internacie – aŭ por faciligi la internacian komunikadon por ĉiuj homoj kaj pri ĉiuj temoj (Neis 2009, 803). Ofte la sama aŭtoro intencis per sia lingvo atingi ambaŭ celojn.

Kvankam ne ĉiuj universalaj lingvoj estis kreitaj unuavice por faciligi la internacian komunikadon, la interlingvistiko ofte klasifikas ilin kiel subgrupon de la planlingvoj (ekz. Monnerot-Dumaine 1960, 72–81; Blanke 1985, 125). Mi ĉi tie aliĝas al tiu terminuzo.<sup>1</sup>

*Filozofia lingvo*: La universalajn lingvojn baziĝantajn sur filozofia koncepto-sistemigo oni ankaŭ nomas filozofiaj lingvoj (Couturat kaj Leau 1903, 113–114; Blanke 1985, 125).

*Aprioraj kaj aposterioraj lingvoj*: En la interlingvistiko, kaj ankaŭ iom ekster ĝi, estas tre konata la klasifiko de planlingvoj kiel aprioraj aŭ aposterioraj (foje kun pliaj interaj klasoj). La distingo esence baziĝas sur la kriterio de *inventitaj* (apriora) kontraŭ *pruntitaj* (aposteriora) lingvoele-

---

1 *Universala lingvo*: Pri uzoj de la termino por alitipaj lingvoj, vidu Blanke (1985, 55).

mentoj. La disduigo estas problema ĉar en la aro de la proponitaj planlingvoprojektoj ne observeblas du (aŭ kelkaj) klare distingeblaj klasoj, sed fakte kontinua graduskalo de inventiteco aŭ de pruntiteco. La distingo estas problema krome kaj pli grave pro tio, ke ĝiaj uzantoj ofte ne klare difinas, kiujn trajtojn de la lingvo ili taksas laŭ tiu kriterio (do ĉu vortprovizon, morfologion kaj vortfaradon, sintakson, frazeologion, iun kombinon el ili aŭ ĉu la tutan lingvosistemon). La ĉefa, kvankam ne la origina fonto estas Couturat kaj Leau (1903, XXVII–XXVIII). Mi pli detale diskutas la devenon, la enhavon kaj la problemojn de la klasifiko en aliaj publikaĵoj (Schubert 2018a,b).

Notindas, ke la filozofiaj lingvoj plej kutime estas aprioraj, dum tamen ankaŭ ekzistas aprioraj lingvoj nefilozofiaj.

Necesas diri iom pli pri la filozofiaj lingvoj. Sistemigi la konceptojn de la homa penso, des pli se oni celas inkluzivi *ĉiujn* konceptojn, estas sizifa tasko, sed ĝi ne nepre devas rezulti en lingvosistemo. Fakte ankaŭ la nuntempa terminologio ordigas kaj difinas konceptojn – ne ĉiujn, sed tiujn de limigitaj fakoj – kaj ĝi tion faras per konstruo de konceptosistemoj. Tia sistemo esence estas listo de terminoj signifantaj konceptojn. Al ĉiu termino oni aldonas difinon kaj indikojn pri la semantikaj rilatoj inter la difinata koncepto kaj aliaj. El tiuj semantikaj ligoj inter konceptoj estiĝas la sistemo.

Konceptosistemo en si mem ne estas lingvo. Minimume du faktoroj tamen instigas la aŭtorojn de universalaj konceptosistemoj al la sekva paŝo, krei gramatikon – kaj per tio lingvosistemon. La unua faktoro estas la senlima kvanto de la homaj konceptoj. Por evidentigi aŭ estiĝi regulecon en la konceptaro (kaj ankaŭ por redukti la laboron) oni klopodas trovi bazajn konceptojn kaj regulojn per kiuj oni povas konstrui kompleksajn konceptojn. Tio ja estas la sama ideo, kiun sur la nivelo de vortoj utiligas la vortfaraj regularoj de la lingvoj.<sup>2</sup> La dua faktoro puŝas en la saman direkton. Iuj el la filozofoj okupiĝantaj pri konceptosistemigo deziris ne nur krei sistemon, sed paŝi plu kaj havigi al si eblecon per la konceptoj esprimi propoziciojn kaj el la konceptoj inferenci.<sup>3</sup> Jam per la ebleco de propozicio al la konceptosistemo aldoniĝas gramatiko, tiel ke rezultas lingvo.

2 *Vortfarado*: Multaj aŭtoroj de planlingvoj speciale sistemigis la vortfaradon, ankaŭ por redukti la lernadon. Oni bone scias, ke kompare al aliaj planlingvoj Esperanto posedas aparte produktivan vortfaran regularon (Schubert 2015).

3 *Konceptosistemo, propozicio, inferenco*: Tiel rezonis ekzemple Leibniz (vidu Arndt 1967, 72). Simile tezis Wüster, unu el la fondintoj de la modernaj scienco kaj praktiko de terminologio. Li verkis ampleksan monografion ellaborante la ideon de internacie normigendaj terminoj kaj li aldonis okan ĉapitron, en kiu li enkondukas la ideon de “Satzfähiges internationales Benennungssystem (internationale Sprache)” ‘fraztaŭga internacia sistemo de terminoj (internacia lingvo)’ (Wüster 1931, 277). En tiu ĉapitro Wüster diskutas planlingvojn, post longa kompara analizo rekomendante Esperanton. Cetere, en la sama libro Wüster enkondukas la terminon *Plansprache* (planlingvo) (sen difini ĝin). Ne hazarde ankaŭ aliaj iniciatantoj de la terminologio estis fakuloj kun aktiva scipovo de planlingvoj, precipe de Esperanto, inter kiuj elstaras Ernest Drezen (Picht 1996, 28; v.a. Schubert 2007, 144).

Kaj se oni kreis lingvon, kial do ne komuniki per ĝi – inter filozofoj aŭ pli vaste inter ĉiudisciplinaj fakuloj aŭ eĉ plej vaste inter ĉiuj homoj kaj pri ĉiuj temoj (Schubert aperos). Tial la transiro de konceptosistemiga universala lingvo kaj lingvo por ĝenerala komunikado estas malakra, obtuza. Ankaŭ tio pravigas la terminuzon, laŭ kiu universalaj lingvoj estas planlingvoj.

### 3 La komparataj lingvoj

Ĉi tiu studo ekzamenas la demandon, ĉu aliaj planlingvoj antaŭ Volapük funkciis en fakta komunikado. Laŭ la fontoj, kiujn mi povis trovi, kandidatoj por tiu plifruco estas la lingvo Solresol de Sudre kaj la universala lingvo de Sotos Ochando. En ĉi tiu sekcio mi prezentas la bazajn faktojn pri la tri lingvoj.

Antaŭ tio indas pliprecizigi, kiujn faktojn ni serĉas en la ĉi-sekvaj prezentoj. Temas pri fakta komunikado. Mi komprenas la koncepton tiel, ke homoj interkomunikas en la koncerna lingvo kaj parole kaj skribe pro reala komunika bezono. Sub reala komunika bezono mi do komprenas nek la ludan uzadon en la maniero de sekretaj lingvoj de infanoj, nek la uzadon de planlingvo por la nura celo montri, ke eblas uzi ĝin. Por planlingvo celanta faciligi la internacian komunikadon pli forta pruvo de reala komunikivo estas interparolo aŭ interskribo de personoj kun malsamaj denaskaj lingvoj, kaj ankoraŭ pli forta, se tiuj personoj ne havas alian komunan lingvon. Se mi ĉi tie uzas la verbojn *paroli* kaj *skribi*, tio validas por la tri ekzamenataj lingvoj. Oni ja konscias, ke ekzistas lingvoj por nura skriba uzo, la pazigrafioj, kaj ke ekzistas lingvoformoj por handikapitoj utiligantaj nek la aŭdan, nek la vidan, sed la tuŝan senson.

Mi jen prezentas Solresolon (sekcio 3.1), la lingvon de Sotos Ochando (sekcio 3.2) kaj Volapukon (sekcio 3.3).

#### 3.1 Solresol

La lingvon Solresol kreis Jean-François Sudre. La aŭtoro mem nomis ĝin franclingve *langue musicale* “muzika lingvo” aŭ *langue universelle* “universala lingvo” aŭ *langue musicale universelle* “universala muzika lingvo”<sup>4</sup> La nomon *Solresol* (aŭ *Solrésol*) la lingvo ricevis en publikaĵoj aperintaj post la morto de Sudre. Ĝi estas la solresola vorto por “lingvo”. Sudre estis franca muzikisto, komponisto kaj instruisto de muziko, kiu vivis de 1787 ĝis 1862. Ekde 1817 li laboris pri la lingvo, ekde 1823 prezentadis ĝin al la publiko kaj al diversaj sciencaj kaj ŝtataj institucioj, ĉefe en Francio, sed ankaŭ en najbaraj landoj

---

4 *Glosoj*: Ĉiuj glosoj kaj tradukoj al Esperanto en ĉi tiu artikolo estas faritaj de mi.

(François Sudre 1866, unua parto V–XXIX).<sup>5</sup> Sudre aperigis aron da raporto kaj broŝuroj pri la lingvo (Bibliothèque 2023a) kaj ankaŭ kelkaj aktivuloj verkis aŭ prelegis pri ĝi (ekz. Gajewski 1885).<sup>6</sup> Tamen la ĉefa publikaĵo aperis nur post la morto de la aŭtoro sub lia nomo (François Sudre 1866).<sup>7</sup> Krome estis publikigitaj priskribo/lernolibro pri la lingvo de lia vidvino Marie-Joséphine Sudre (1883) kaj gramatiko (Gajewski 1902).<sup>8</sup> Solresol ricevis aron da agnoskoj de akademioj en Francio kaj ĝia aŭtoro estis plurfoje premiita pro la lingvo (François Sudre 1866, unua parto V–XXIX).

Inter la planlingvaj projektoj Solresol estas speciala precipe pro tio, ke ĝi uzas kiel esprimilojn la sep bazajn muzikajn notojn de la tradicia eŭropa skalo. Ilin eblas ludi per muzika instrumento, kanti, aŭ prononci per la solfeĝaj silaboj. Evidente la muziknotojn aŭ la silabojn ankaŭ eblas skribi aŭ presi. Krome oni povas utiligi aliajn sep signojn, ekzemple ciferojn, stenografiajn simbolojn, gestojn aŭ kolorojn (François Sudre 1866, dua parto I–XXIV; Couturat kaj Leau 1903, 33; Blanke 1985, 134). Per tio, ke Solresol povas utiligi diversajn sensojn, ĝi ankaŭ taŭgas por senshandikapitoj kaj fakte oni propagandis ĝin por tia uzo (François Sudre 1866, nenumerita paĝo antaŭ p. I de la unua parto; Guadet 1864). Sudre mem krome proponis ĝin por aŭda aŭ vida armea distancsignalado.<sup>9</sup>

5 *Sudre*: En la cifereca versio, kiun mi uzas, la libro enhavas du partojn, ĉiu el kiuj estas aparte paĝnumerita per romanaj ciferoj ekde I, plus vortaran parton sen paĝnumeroj.

6 *Gajewski kaj Kerckhoffs*: La Franca Nacia Biblioteko katalogas deksespaĝan broŝuron *Examen critique de la langue universelle de Sudre* el 1886 de la aŭtoroj August Kerckhoffs kaj Boleslas Gajewski indikante ke ĝi estas eltiraĵo el la *Bulletins de la Société d'Anthropologie*, kunsido de 01.10.1885 (Bibliothèque 2023b). Ankaŭ Kerckhoffs (1886, reklama paĝo antaŭ la titolpaĝo) anoncas tiun broŝuron. Samkiel Garvía (2015, 175 n. 19) mi ne vidis la broŝuron. Sed konsultante la publikaĵon en *Bulletins* (Gajewski 1885) mi trovas ne tekston komune verkitan de la du sinjoroj, sed prelegon de Gajewski enhavantan tre koncizan priskribon de Solresol kun la tezo, ke multaj el la ideoj tiam atribuataj al la aŭtoro de Volapük estis pli frue vortumitaj de Sudre. En *Bulletins* post la prelego sekvas diskuto, en kiu tre longe kaj kritike parolas Kerckhoffs kun kelkaj respondoj de Gajewski kaj nur malmultaj kontribuajoj de aliaj ĉeestantoj. August(e) Kerckhoffs estis unu el la plej gravaj aktivuloj en la movado kaj la lingva evoluigo de Volapük (Blanke 1985, 211; Barandovská-Frank 2020, 128–131; v.a. sekcio 3.3).

7 *Sudre*: Laŭ Sakaguchi (1998, 471) tiu libro estas la 2-a eldono de libro origine publikigita en 1847. En la libro mem kaj en la katalogo de la Franca Nacia Biblioteko mi por tio ne trovas konfirmon (Bibliothèque 2023a). Ankaŭ Couturat kaj Leau (1903, 36–37) kaj Duliĉenko (1990, 89–90) nur parolas pri libro de 1866, ne de 1847.

8 *Gajewski*: De ĉi tiu libro mi ne trovis presitan ekzempleron, sed nur nefaksimilajn ciferecaĵojn en pluraj lingvoj. Krause (2018, 89) informas, ke Gajewski en sia gramatiko grave reviziis la lingvon.

9 *Telefonio*: La distancsignaladon laŭ la modelo de Sudre oni siatempe nomis *téléphonie*, pro kio kelkloke aperas la informo, ke Sudre inventis la telefonion (François Sudre 1866, titolpaĝo n. 1; Figuiet 1868, 69; Couturat kaj Leau 1903, 39; v.a. Rose 2013). La elektran telefonon uzatan en tio, kion ni nuntempe nomas telefonio, tamen inventis aliaj pli poste. Legante la fontojn mi ne samopiniis kun aŭtoroj kiel ekzemple Rij (2015, 149) aŭ Kocher (2022, 106 n. 14), laŭ kiuj Sudre nomis sian lingvon *téléphonie*.

La interlingvistoj aparte notas Solresolon pro tio, ke ĝi estas (vortprovi-ze) apriora, sed ne filozofia lingvo. Solresol ne estas la sola muzika lingvo proponita (Calero Vaquera 1999, 15 n. 11; Rodríguez Ponce 2020).<sup>10</sup> Serĉante respondon al la demando, ĉu Solresol funkciis en vera komunika-do, oni trovas la jenajn informojn:

(1) *Ekzistis societo de adeptoj de Solresol.*

Ekzistis Société pour la propagation de la langue universelle Solresol (Societo por la propagando de la universala lingvo Solresol) fondita de Marie-Joséphine Sudre kaj Vincent Gajewski, la patro de Boleslas Gajewski (Couturat kaj Leau 1903, 37), kies gramati-kon mi supre notas.<sup>11</sup> Couturat kaj Leau (1903, 36–37) konstatas, ke Solresol havis sian eniron en la mondon nur per la libro de 1866. Laŭ Duliĉenko (1990, 89) la Societo ekzistis ĝis la komenco de la 20-a jarcento. Guérard (1922, 85, 93) notas, ke en la tempo de lia verkado ĝi ankoraŭ iomete vivis. Ankaŭ nuntempe (en 2023) oni konservas la memoron pri Solresol; tio videblas en la retejo Sidosi (2021), kiu tamen estas verkita ne en Solresol, sed en la angla.

Garvía zorgas noti, ke la Societo por Solresol estis fondita post la morto de Sudre en 1862 kaj supozeble post la apero de la libro en 1866 (Garvía 2019, 325 n. 1). Garvía per tio emfazas, ke la adeptaro de Solresol estiĝis post tiu de la lingvo de Sotos Ochando. Garvía tamen ne konsideras la adeptaron de Solresol kiel movadon. Tion mi konkludas, ĉar Garvía (2019, 341) diras, ke post la lingvo de Sotos Ochando la dua planlingvo en la vico, kiu havis movadon, estis Volapük (do ne Solresol, kvankam ties adeptaro estiĝis pli frue ol tiu de Volapük).

(2) *Solresol en Francio dum kelkaj jardekoj estis populara.*

Tion konstatas Barandovská-Frank (2020, 122). Bausani (1974/1970, 112) parolas pri granda, sed mallongedaŭra sukceso. Neniu el ĉi tiuj aŭtoroj tamen raportas pri fakta uzo.

---

10 *Solresol*: Kroniko de Solresol: Marie-Joséphine Sudre (1866). Inter la ĉefaj duavicaj fontoj pri la lingvo kaj ĝia adeptaro estas Figuiet (1868, 69–76), Couturat kaj Leau (1903, 33–39), Drezen (1928/1931, 80–81), Monnerot-Dumaine (1960, 78–79), Bausani (1970, 110–112), Blanke (1985, 134–135), Large (1985, 60–63), Duliĉenko (1990, 89–90), Sakaguchi (1998, 129–131), Astori (2011), Décimo (2014, 216 n. 34) kaj Rodríguez Ponce (2020, 154–161).

11 *Société*: Laŭ Barandovská-Frank (2020, 122) la vidvino fondis en 1869 “Centran komitaton por studo kaj progreso de Solresol.” La (tradukita) nomo de la societo kaj la fondoĵaro ne kongruas kun la informoj, kiujn mi trovis. Por tiu malkongruo mi ne havas klarigon. Gajewski (1902) mencias propagandan societeton nomatan “Société ‘Le Solrésol’” (Societo Solresol).

- (3) *Solresol supozeble estis la unua planlingvo akirinta iom pli vastan konatecon.*  
Tion asertas anonimaj aŭtoroj de Vikipedio (Plansprache 2022).
- (4) *Solresol estis la unua interlingvo, kiu havis parolantojn.*  
Tion asertas anonimaj aŭtoroj de Vikipedio (Solresolo 2021).
- (5) *Oni komunikis per Solresol dum prezentadoj kaj eksperimentoj.*  
Pri uzado de Solresol dum prezentadoj al la publiko aŭ al ŝtataj instancoj aŭ akademioj kaj dum eksperimentaj signaladoj de la franca armeo raportas François Sudre (1866, unua parto I–XXIX; Couturat kaj Leau 1903, 36–37).
- (6) *Solresol neniam estis praktike uzata.*  
Tion asertas anonimaj aŭtoroj de Vikipedio (Solresol 2022).<sup>12</sup>
- (7) *Kelkaj personoj facile ellernis la lingvon.*  
Tion sciigas Gajewski (1885, 611) parolante pri sinjorino Sudre kaj ŝiaj lernantoj.

Ne pretervideblas, ke ĝuste pri la centra demando de nia esploro, ĉu Solresol havis parolantaron, la informoj unu la alian kontraŭdiras. Oni devas legi la informojn de pluraj el la cititaj aŭtoroj kiel asertojn pli ol kiel faktojn, ĉar ofte mankas referencoj al fontoj, ĉefe, sed ne nur, en la vikipediaj artikoloj.

Krome notindas la jeno: En la jaroj 1854 ĝis 1860 en Parizo aktivis la Société internationale de Linguistique (Internacia Lingvistika Societo), kiu starigis komitaton por analizi kaj taksu universalajn lingvojn kaj elekti la plej bonan. Se ne mi ion preteratentis, la komitataj laborraportoj ne mencias Solresolon.<sup>13</sup> La silento de ĉi tiu Societo pri Solresol estas mirinda, ĉar la ĉefa aktivulo de la Societo, Casimir Henrycy, tre verŝajne persone konis Sudre.<sup>14</sup> Ebla kaŭzo de la nemencio de Solresol ĉe la Societo povas esti la fakto, ke la ĉefaj publikaĵoj pri tiu lingvo aperis nur post kiam la aktivado de la Societo finiĝis en 1860. Aliflanke la Societo ja menciis (eĉ se ne detale studis) ankaŭ

12 *Vikipedio*: En la tempo de mia konsulto (januaro 2023) ĉi tiu artikolo en la germana Vikipedio (Solresol 2022) estas markita kiel problema pro manko de fontoj. Mi tamen mencias ĝin por montri, ke cirkulas la aserto / tezo / informo, ke Solresol neniam estis uzata.

13 *Internacia Lingvistika Societo*: La dokumentoj de la Societo plejparte aperis en la revuo *La Tribune des Linguistes* (1858–1859, 1859–1860). Pri la interlingvistika laboro de la Societo mi en aliaj publikaĵoj raportas kun detalaj bibliografiaj referencoj al la laborraportoj (Schubert 2018a,b).

14 *Henrycy kaj Sudre*: Ekster sia lingva agado en 1848 aŭ pli frue Henrycy verkis tekston por muzikaĵo de Sudre. La kombino de la jenaj fontoj montras, ke fakte temas pri la personoj figurantaj en nia esploro kaj ne pri iuj samnomuloj: Feuilleton (1848), Gaudin (2009), vidu ankaŭ Décimo (2014, 216 kaj n. 34). La publikaĵoj de Décimo tuŝantaj la Internacian Lingvistikan Societon supozeble baziĝas sur ampleksa materialo kaj fontaro, sed ne ĉiam estas fidindaj rilate al la precizeco de citaĵoj, nomoj, faktoj kaj fontoj (Schubert 2018, 11 n. 14).

sufiĉe malpretajn planlingvoprojektojn. Dum la Societo ne preparolas Solresolon, inverse en kroniko de la lingva agado de Sudre ne aperas mencio de la Internacia Lingvistika Societo aŭ de Henricy (Marie-Joséphine Sudre 1866).

Mi konkludas, ke Solresol dum kelka tempo estis populara, ke ĝi havis adeptojn kaj ke okazis komunikado sur eksperimenta aŭ prezentada nivelo kaj supozeble en kursoj. Mi krome notas, ke mi ne trovis pruvojn aŭ indicojn de komunikado inter aliaj ol samlingvanoj.

## 3.2 La universala lingvo de Sotos Ochando

Iam ĉirkaŭ la jaro 1850 en Hispanio estis publikigita ellaborita sistemo de universala lingvo. Ĝia aŭtoro estis *Bonifacio Sotos Ochando*,<sup>15</sup> hispano, kiu vivis de 1785 ĝis 1869 kaj estis katolika pastro, doktoro kaj poste profesoro de teologio, rektoro de universitato, lingvoinstruisto kaj politikisto. La plejparton de sia vivo Sotos Ochando pasigis en Hispanio, sed vivis en ekzilo en Francio de 1823 ĝis 1840 kaj denove en la 1850-aj jaroj, ĉi-foje pro sia lingvo.<sup>16</sup> Krom pri religio li verkis pri la universala lingvo, lingvoinstruado kaj tradukado kaj li estas konsiderata anticipanto de la fonetiko (Verna Haize 1999).<sup>17</sup>

Sian lingvon Sotos Ochando nomis hispanlingve *Lengua universal* “universala lingvo” aŭ *Proyecto de lengua universal* “projekto de universala lingvo” kaj ofte simple *el Proyecto* “la projekto”.<sup>18</sup> La unuajn ideojn li publikigis en 1845 kaj la plenan lingvosistemon en 1852 aŭ iom pli frue.<sup>19</sup> Liaj tri

15 *Nomo*: En la teksto de la artikolo de Garvía (2019, 328, 342) la persona nomo de Sotos Ochando estas *Bonifacio*, en la referencaro tamen *Antonio*. Laŭ ĉiuj aliaj fontoj, inter ili la katalogo de la Hispana Nacia Biblioteko, la ĝusta nomo estas *Bonifacio*. Garvía eraras eble pro tio, ke unu el la pseŭdonimoj de Sotos Ochando estis *Antonio Ochoa Sbisocof* (Biblioteka 2023c).

16 *Vivo de Sotos Ochando*: Baquero Almansa (1884, 190–199), Codorníu (1914), Mateos y Sotos (1986), Fuster Ruiz (1996), Calero Vaquera (1999, 63–71).

17 *Verkoj de Sotos Ochando*: Fuster Ruiz (1986).

18 *Nomo de la lingvo*: Laŭ mia kompreno Sotos Ochando ne donis al sia lingvo nomon pli specifan ol ‘universala lingvo’. Kiel adjektivon rilatan al la lingvo li kelkfoje uzas *universal*. Kelkaj aŭtoroj (ekz. Noordegraaf 1988) konkludas el tio, ke la nomo de la lingvo estis *Universal*; mi ne samopinias, interalie ĉar en la franclingvaj publikajoj la supozita nomo *Universal* ne aperas (Sotos Ochando 1855a, 1855b). – Rónai (1969, 33) nomas la lingvon *Bonifaciano* aŭ *Bonifacianisch*, sed tio ŝajnas al mi esti ne pli ol amuza inventaĵo de Rónai. La popularsciencan libron de Rónai mi nur konas en la germana traduko, kiu estas pli ampleksa ol la portugallingva originalo.

19 *Unua libro*: Malfacilas identigi ekzaktan aperodaton aŭ “unuan libron” de la lingvo de Sotos Ochando. En 1845 la aŭtoro publikigis en la hispana ĵurnalo *El Heraldo* kvin artikolojn pri universala lingvo (Sotos Ochando 1845a–d). En ili li skizas bazajn principojn por konstrui universalan lingvon, sed ne jam detale ellaboras la lingvosistemon. La unua artikolo estas anonima, dum la aliaj estas subskribitaj “S. O. B.”. Calero Vaquera (1999, 152) notas ĉiujn



ĉefaj hispanlingvaj monografioj pri la lingvo estas ĝenerala priskribo kun gramatiko kaj vortaro, aparta vortaro kaj aparta gramatiko (Sotos Ochando 1852, 1862, 1863). Krome aperis vortaro/gramatiko/lernolibro de du el la ĉefaj aktivuloj (Gisbert kaj Lorrio 1862; v.a. Cano Calderón 1987).<sup>20</sup>

La lingvo estas apriora en la vortprovizo kaj la baza fleksia morfologio, sed en vortfarado kaj sintakso transprenas latinidajn modelojn. Sotos Ochando proponas por sia lingvo novan alfabeton en la formo de stenografieca signaro, sed permesas, ke oni provizore tamen uzu la latinan alfabeton (Sotos Ochando 1852, 50–56, 1855, 43–45). La morfemoj estas arbitre inventitaj surbaze de klasifiko de konceptoj. La plej ĝeneralajn konceptojn signas la unua litero de la morfemo kaj ĉiu plia litero signas subkoncepton tiel igante la signifon de la tuta morfemo pli specifa.<sup>21</sup> Por ke la vortoj estu prononceblaj, alternas konsonantoj kaj vokaloj. Sotos Ochando klopodas klasifiki la konceptojn de la homa penso kaj signi ĉiun el ili per specifa ĉeno de literoj. En tio la unuopaj literoj do ne mem estas morfemoj, sed distingiloj kun signifo dependanta de la antaŭaj literoj kaj sekve de arbitra difino de la lingvoaŭtoro. Similan teknikon oni renkontas en pluraj el la filozofiaj universalaj lingvoj, ekzemple la skizoj aŭ sistemoj de Kartezio, Dalgarno, Wilkins aŭ Leibniz.<sup>22</sup> El kelkaj rimarkoj de Sotos Ochando pluraj interlingvistoj konkludis, ke li konstruis sian lingvon sen scio pri pli fruaj univer-

---

kvin sub la aŭtoronomo Sotos Ochando. Laŭ Garvía (2019, 328 kaj n. 4) la artikoloj aperis nur en 1851, sed la rete konsultebla ĵurnalo klare montras la jaron 1845. Kvankam Sotos Ochando atribuas la ideon ellabori universalan lingvon kaj ĝiajn bazajn trajtojn al subita inspiro en 1845 (Mata 1862, 318; Baquero Almansa 1884, 194), Mas Galvañ prezentas indicojn, kiuj kredebligas, ke Sotos Ochando jam en Francio, do plej malfrue en 1840, komencis labori pri la universala lingvo (Mas Galvañ 1997, 804–806; v.a. Garvía 2019, 329). Kiel la ĉefan publikaĵon pri la lingvo la interlingvistoj kutimas mencii la monografion *Proyecto y ensayo de una lengua universal y filosófica* (Sotos Ochando 1852). Ĝia titolo pagis nomas ĝin 2-a eldono, sed oni ne trovas klaran informon pri ia 1-a eldono. Kelkaj fontoj por tiu nomas la jaron 1850, aliaj 1851. La Hispana Nacia Biblioteko notas por la 1-a eldono la jaron “185-?” kaj amplekson de 34 paĝoj (Biblioteca 2023b). La 2-a eldono do ne povas esti simpla represo, eble kelkloke aktualigita kaj kompletigita, ĉar ĝi estas multe pli ampleksa ol la 34 paĝoj de la 1-a eldono. Fuster Ruiz katalogas unu 2-an eldonon kun 112 paĝoj kaj alian 2-an eldonon kun 264 paĝoj, ambaŭ de 1852 (Fuster Ruiz 1986, 154).

- 20 *Publikaĵoj*: Sotos Ochando kaj la aktivuloj publikigis multnombrajn librojn, broŝurojn kaj aliajn materialojn, kiuj ofte aperis en diversaj malsamaj versioj kaj kiuj parte estas rekompilaĵoj de pli fruaj tekstoj. Krome Sotos Ochando kelkfoje uzis pseŭdonimojn. Tial malfacilas akiri kompletan superrigardon pri liaj verkoj aŭ la publikaĵoj pri la lingvoprojekto. La bibliografia studo de Fuster Ruiz (1986) listigas multon, sed certe ne ĉion.
- 21 *Lingvo de Sotos Ochando*: Duavicaj fontoj estas interalie Henricy (1858b, 152–169), Couturat kaj Leau (1903, 59–70, 115–119), Monnerot-Dumaine (1960, 76), Mourelle-Lema (1968, 135–141), Velarde Lombrana (1987), Duliĉenko (1990, 78–79) kaj Calero Vaquera (1993, 227–232, 1999, 63–93).
- 22 *Filozofiaj lingvoj*: Kartezio kaj Leibniz skizis ideojn pri universalaj lingvoj, Dalgarno kaj Wilkins ellaboris sistemojn. Pri ili ekzistas abunda literaturo, al kiu ne eblas ĉi tie detale referenci. Aliron al ĉiuj kvar ofertas Couturat kaj Leau (1903, 11–28).

salaj lingvoj.<sup>23</sup> Tamen aliaj lingvistoj trovas la similecon al konataj filozofiaj lingvoj tro okulfrapa kaj konsideras la aserton de Sotos Ochando apenaŭ kredebla (Calero Vaquera 1993, 227 n. 22, 233). Mas Galvañ eĉ parolas pri “el carácter epigónico” (la epigoneco) (Mas Galvañ 1997, 807) de la lingvo de Sotos Ochando.

Sotos Ochando aspiris krei lingvon por la tutmonda skriba komunikado inter kleruloj kaj tiucele konstrui vortprovizon, kiu spegulas la naturan kaj logikan ordon de la aĵoj (Sotos Ochando 1852, 23, 26). La aŭtoro opinias, ke lia lingvo estas alirebla nur por homoj kun certa edukiteco, kaj deziris, ke oni ĝin instru en ĉiuj lernejoj kaj edukejoj, “aun de las señoritas” (eĉ por fraŭlinoj) (Sotos Ochando 1852, 26). Ĝeneralan ĉiutagan lingvon por la tuta mondo li tamen konsideras malebla (Sotos Ochando 1852, 9 n. 1, 1855a, 125, 149). Same li kredas, ke parola interkompreniĝo per lia lingvo estus malfacila, ĉar la popoloj prononcas la literojn malsame (Sotos Ochando 1852, 12 n. 1). Malgraŭ tiu miriga konstato li ja difinas la prononcon (Sotos Ochando 1852, 50–56, 1855, 42–43).

Kiam Sotos Ochando eksciis pri la fondo de la Internacia Lingvistika Societo (v. supre 3.1) en 1854,<sup>24</sup> li rapidis parizen, tradukigis al la franca libron pri sia lingvo,<sup>25</sup> membriĝis al la Societo (Lorrio 1861, 29–30) kaj komence de 1855 prezentis al ĝi sian lingvoprojekton.<sup>26</sup> Li restis pliajn du jarojn en Parizo laborante pri la faka vortprovizo. Nur post la reveno al Hispanio lin en 1857 atingis la juĝo de la Societo: plena sukceso!<sup>27</sup> Profunde ekzameninte la lingvoprojekton kaj komparinte ĝin kun aliaj, la Societo deklaris la lingvon de Sotos Ochando la plej bona ĝisdate konata universala lingvo (Henricy 1858b, 152–169). Tio tamen ne malhelpis la Societon kritiki la lingvoprojekton kaj proponi plibonigojn (Henricy 1858b, 169, 1859a, 244, 1859b, 294).

23 *Sen scio pri aliaj universalaj lingvoj*: Vidu interalie Henricy (1858b, 154), Mata (1862, 318), Couturat kaj Leau (1903, 75 n. 1), Mourelle-Lema (1968, 120).

24 *Societoj*: Laŭ Lázaro (1948, 242) oni en Parizo kaj en Londono fondis societojn por disvastigi la lingvon de Sotos Ochando. Nek pri unu, nek pri la alia mi havas ajnan informon aŭ indicon. Se Lázaro celas la parizan Internacian Lingvistikan Societon, li eraras, ĉar ĝi laŭ la fontoj konataj al mi ne fondiĝis pro Sotos Ochando.

25 *Franclingva publikaĵo*: La libro (Sotos Ochando 1855a) estas tradukaĵo el la hispana. Tamen laŭ mia scio ne ekzistas publikigita hispanlingva libro, kiu estus la ekzakta fontoteksto de ĉi tiu traduko. Supozeble por la prezento al la pariza Societo Sotos Ochando kompilis kaj rearanĝis tekstojn pli frue uzitajn, eble aldonante novajn erojn (v.a. Calero Vaquera 1999, 66; v.a. Garvía 2019, 334). Krom la 270-paĝa volumo ekzistas konciza versio sur 39 paĝoj (Sotos Ochando 1855b).

26 *Prezentado*: Laŭ Ojo y Gómez (1860, 12) Sotos Ochando dufoje prelegis antaŭ granda publiko (v.a. Mateos y Sotos 1986, 143; v.a. Mas Galvañ 1997, 803). Henricy (1860, 115) konfirmas unu prelegon. Povas esti, ke ambaŭ pravas kaj ke temas pri entute tri (aŭ pli da) prelegoj. La informoj pri la pariza Societo ne estas tute klaraj, sed mi konkludas el ili, ke okazis kaj publikaj prelegoj antaŭ la pli larĝa Societo kaj prelegoj antaŭ ĝia 23-persona Komitato pri la universala lingvo.

27 *Juĝo*: Laŭ Velarde Lombrana (1987, 42) la juĝo de la Societo alvenis nur en 1858.

En Hispanio kolektiĝis por la lingvo adeptaro kaj aktivularo. La hispana registaro asignis subvencion,<sup>28</sup> per kiu eblis en 1860 fondi en Madrido la Sociedad de lengua universal (Societon de universala lingvo), kiu organizis kursojn (Boletín 1862, 286; Garvía 2019, 339), instigis kaj subvencis la instalon de katedroj (Calero Vaquera 1993, 227; Garvía 2019, 339), okazigis lekcieron<sup>29</sup> kaj eldonis la revuon *Boletín de la Sociedad de lengua universal* (Bulteno de la Societo de universala lingvo).<sup>30</sup> En la kulmino de sia agado, ĉi tiu Societo havis preskaŭ 200 membrojn (Alameda 1862). Tamen la movado supezeble estis pli granda ol tiu ducento: La membrolisto de Alameda enhavas nur sinjorojn, dum laŭ Calero Vaquera (2020, 138–139) inter la interesiĝantoj pri la lingvo estis aparte multaj sinjorinoj. La membroj troviĝis plejparte en Hispanio, sed estas listigita ankaŭ manpleno da sinjoroj en Francio, el kiuj kelkaj antaŭe aktivis en la pariza Societo.<sup>31</sup> Nur kelkajn semajnojn post la fondo de la madrida Societo Sotos Ochando iĝis grave malsana por la resto de sia vivo kaj devis ĉesigi sian agadon por la lingvo. Liaj movadanoj pluaktivis ankoraŭ kelkajn jarojn, ĝis en 1867 ili malfondis la Societon (Fuster

28 *Subvencio*: Laŭ Calero Vaquera (1993, 227), Fuster Ruiz (1996, 153) kaj Mas Galvañ (1997, 803) la hispana subvencio estis asignita antaŭ la pozitiva juĝo el Parizo, dum laŭ Garvía (2019, 336–337) la sinsekvo estas inversa.

29 *Lekciaro*: La dek unu lekcioj de Pedro Mata estas publikitaj en 456-paĝa volumo (Mata 1862). Mata amplekse referas la laborojn de la Komisiono pri la universala lingvo de la pariza Internacia Lingvistika Societo, aldonante tamen ankaŭ proprajn ideojn (vidu sekcion 4). Garvía (2019, 338) opinias, ke Mata la parizanojn plagiatas, sed ĉar Mata ja ĉiam denove indikas sian fonton, mi ne juĝus tiel severe.

30 *Revuo*: La Hispana Nacia Biblioteko katalogas la revuon sub la titolo *Boletín de la Sociedad de Lengua Universal* (Biblioteka 2023a). Same la titolo aperas en vol. 1, n-ro 1 (Gisbert 1861). En kelkaj titoloj de la revukajeroj ĝi aperas kun ekstra *la* antaŭ *Lengua* (ekz. vol. 1, n-ro 3), samkiel ankaŭ la nomo de la Societo aperas jen kun, jen sen tiu ekstra vorto. Garvía (2019, 337) redonas ĝin kiel *Boletín de la Lengua Universal*. – La revuo aperis de 1861 ĝis 1864 kun efemera revivigo en 1866 (Fuster Ruiz 1986, 170; Calero Vaquera 1999, 67 n. 29, 145). Krome Fuster Ruiz mencias franclingvan version de la revuo aperintan en Madrido en 1862, kiun li tamen ne vidis (Fuster Ruiz 1986, 170, 1996, 160). Mi same ne vidis ĝin kaj ne havas aliajn indicojn pri ĝia ekzisto.

31 *Sociedad*: En la listo de la membroj de la madrida Societo aperas la listero “Lettellier (M. P. L. A.). – *Caen*.” (Alameda 1862, 191). Ĉar la listo enhavas aron da preseraroj, mi kredas, ke ankaŭ ĉi tie oni mispresis kaj ke fakte temas pri C.-L.-A. Letellier el Caen (Francio). (M. = *Monsieur* [sinjoro].) Letellier estas la aŭtoro de propra universala lingvo (Letellier 1852 kaj aliaj verkoj; duavice: Couturat kaj Leau 1903, 46–58; Duliĉenko 1990, 108–109), kiu en la juĝado de la pariza Komitato atingis la duan viclokon post la lingvo de Sotos Ochando. Letellier pri tio tre ĉagreniĝis (Letellier 1859a, 1859b) kaj estas do mirinde, ke li, se mia konjekto pravas, kelkajn jarojn poste kunlaboris en la Societo de sia konkurinto. – Plia notindaĵo estas, ke laŭ Garvía (2019, 339) inter la membroj de la madrida Societo estis Sudre. Ĉe Alameda (1862) tiu nomo ne aperas kaj ankaŭ en sia kroniko de la lingva agado de la edzo Marie-Joséphine Sudre (1866) ne mencias la madridan Societon aŭ Sotos Ochando.

Ruiz 1996, 162; Mas Galvañ 1997, 804). En 1863 oni lastfoje publikigis libron de Sotos Ochando, aŭ eble en 1892.<sup>32</sup>

Ĉar ĉi tie mi metas la lingvon de Sotos Ochando apud Volapukon, meritas flankan intereson la libro de Vinader y Doménech (1885). Verkante post la apero de Volapük la aŭtoro per ardaĵ vortoj alvokas siajn hispanlingvaj legantojn militi (!) kontraŭ la nova germana inventaĵo Volapük kaj defendi la genian lingvon de sia samlandano Sotos Ochando. La titolpaĝo informas, ke temas pri konsiderinde simpligita versio de la lingvo; mi tamen ne esploris, en kio konsistas la simpligo. Por nia nuna studo estas notinde, ke Vinader y Doménech konsideras Volapukon konkurenca al la lingvo de Sotos Ochando. Miaopinie tio implicas, ke laŭ li ĝi samkiel Volapük estas lingvo por internacia komunikado kaj, se oni rajtas plukonkludi, ke do la lingvo de Sotos Ochando ne unuavice estas lingvo de filozofia konceptosistemigo.

En la interlingvistiko la lingvo de Sotos Ochando ofte, se entute, estas menciata nur kiel unu el multaj projektoj. Tamen Garvía (2019, 325) elstarigas ĝin metante antaŭ sian artikolon kiel moton citaĵon de Gaston Moch, konata aktoro de la Esperanto-Ido-afero, kiu opiniis, ke la lingvo de Sotos Ochando estis la unua, kiun oni povas serioze kalkuli al la veraj artefaritaj lingvoj (Moch 1897, 292). Bedaŭrinde Moch ne motivas sian opinion. Moch ankaŭ ne diras ion pri fakta funkciado de la lingvo.

Serĉante respondon al la demando, ĉu la lingvo de Sotos Ochando funkciis en vera komunikado, oni trovas la jenajn informojn:

(1) *Ekzistis societo de adeptoj de la lingvo de Sotos Ochando.*

Pri la Sociedad de lengua universal raportas multaj aŭtoroj, el ili plej detale Codorníu (1914, 7), Calero Vaquera (1993, 227; 1999, 138), Fuster Ruiz (1996, 157–167) kaj Garvía (2019, 336–339).

(2) *La lingvon portis socia movado.*

Tio estas la ĉefa tezo de Garvía kaj li aldonas, ke supozeble ĝi estis la unua planlingvo kun movado (Garvía 2019, 341). Necesas kalkuli al la movado pli da personoj ol nur la societanojn (Calero Vaquera 2020, 138–139).

Nuntempe ekzistas malgranda retejo dediĉita al la lingvo. Ĝi leĝblas en kvin lingvoj paralele, inter ili en Esperanto, tamen ne en la lingvo de Sotos Ochando. En la retejo oni ne parolas pri nuntempaj adeptoj, sed informas, ke la lingvo “baldaŭ falis en forgeson” (Lingvo Universala 2021).

---

<sup>32</sup> *Lasta libro*: Fuster Ruiz (1986, 169) mencias libron publikigitan en 1892. Estas duavica referenco, tiel ke Fuster Ruiz ne mem vidis tiun libron.

- (3) *Oni instruis la lingvon en kursoj.*  
Tion raportas interalie Baquero Almansa (1884, 198), Cano Calderón (1987, 97) kaj Fuster Ruiz (1996, 160). Kun referenco al siatempa raporto (Boletín 1862) Garvía (2019, 339) notas, ke oni instruis al entute okdeko da lernantoj kun ekzamenoj kaj diplomoj.
- (4) *En la kursoj eĉ la instruantoj ne flue regis la lingvon.*  
Tion raportas Codornú (1914, 9), posta esperantisto kaj membro de la Lingva Komitato, kiu en sia junaĝo aŭskultis lekcionojn de Gisbert en ĉeesto de Sotos Ochando (Codornú 1914, 4).
- (5) *La lingvo ne havis parolantojn.*  
Tion konstatas Codornú (1914, 9). La sociologo Garvía studas la lingvon ne kiel lingvisto, sed kiel esploranto de sociaj movadoj (Garvía 2019, 326). El tiu vidpunkto li trovas kelkjure viglan movadon kaj notas, ke okazis kursoj (Garvía 2019, 339). Ekster la kursoj li tamen ne raportas pri parolantoj aŭ alispeca uzo.

Mi konkludas, ke ne troveblas raportoj pri fakta komunikado en la lingvo de Sotos Ochando ekster kursaj (kaj eble prezentataj) situacioj kaj ke laŭ la haveblaj informoj ne komunikis malsamlingvanoj.

### 3.3 Volapük

En 1879 en Germanio aperis revua artikolo kaj en 1880 libro kun la ellaborita sistemo de la planlingvo *Volapük*.<sup>33</sup> La aŭtoro estis Johann Martin Schleyer, kiu vivis de 1831 ĝis 1912 kaj estis katolika pastro. Laŭ propra atesto li regis plurajn dekojn da lingvoj, kaj antikvajn kaj samtempajn. La ideon ellabori tutmondan lingvon li atribuis al subita dia inspiro.<sup>34</sup> Jam antaŭ la inspiro li laboris pri universala alfabeto.<sup>35</sup> Mi prezentas Volapukon pli koncize ol la aliajn du lingvojn, ĉar ĝi en la interlingvistiko estas multe pli bone konata.

Volapük, pli specife: ĝia vortprovizo, kutime estas klasifikata kiel miksitita, do situanta inter la apriora kaj la aposteriora modelo (Couturat kaj Leau 1903, XXVIII). Ĝi havas aposteriorajn trajtojn, ĉar la vortoj estas pruntitaj el etnaj lingvoj, ĉefe la angla. Samtempe ĝi havas apriorajn trajtojn, ĉar la plej

33 *Unua libro*: Schleyer publikigis skizon de la lingvosistemo unue en 1879 en *Sionsharfe*, monata revuo dediĉita al katolika poezio, eldonita de li mem. Tiun version mi ne vidis. Samjare la (ĉu identa?) teksto estis aperigita en instruista revuo sub la aŭtoro nomo *s. i. e.*, kio laŭ Haupenthal (2012, 71 n. 209) estas pseŭdonimo de nevo de la aŭtoro (Julius Schleyer 1879). En 1880 la aŭtoro publikigis kaj mem eldonis la lingvosistemon en libra amplekso (Johann Martin Schleyer 1880).

34 *Inspiro*: Ankaŭ Schleyer emfazis, ke li inventis sian lingvon sen scio pri antaŭaj projektoj (Garvía 2015, 23).

35 *Vivo de Schleyer*: Haupenthal (2012), Barandovská-Frank (2020, 127–128).

multaj vortoj estas ĝis nerekonebleco malsimilitaj for de siaj originoj pro adapto al inventita fonologia principaro. Volapük havas tre multforman aprioran morfologion.<sup>36</sup>

Volapük rapide disvastiĝis kaj akiris movadon kun konsiderindaj kvantoj de kluboj, kursoj, revuoj, kongresoj kaj tiel plu, unue en Eŭropo kaj poste, malpli grandskale, en aliaj kontinentoj.<sup>37</sup> Kiel kutime pri planlingvoj, koncerne la nombron de movadanoj aŭ de parolantoj ekzistas forte diverĝaj taksoj; dek jarojn post la lanĉo la kulmino estis pasita kaj la anaro komencis rapide malkreski (Blanke 1985, 212). Kiel kaŭzojn de la forvelko oni nomas kaj lingvajn kaj movadajn faktorojn. Lingvaj estis la fajnaj fonetikaj nuancoj necesaj por distingi la morfemojn, la arbitra torditeco de la vortoj kompare al la pruntedonaj etnaj lingvoj, kaj la komplikita gramatiko. La ĉefa movada faktoro estis la diktatora sinteno de Schleyer, kiu ne permesis eĉ al la kongresoj aŭ la volapuka Akademio modifi aŭ evoluigi la lingvon sen lia eksplica konsento. Fakte Schleyer anticipe malaprobis la decidojn de la tria kongreso organizita de lia ĉefa kontraŭulo, la supre menciita August(e) Kerckhoffs. La movadanoj parte transiris al konkurencaj planlingvoj, ĉefe Esperanto – la plej fama transiro eble estas tiu de la volapuka klubo de Nurembergo (Germanio), kiu komune esperantiĝis. Pluraj aktivuloj sugestis kaj ellaboris lingvajn proponojn, parte reformojn de Volapük, parte tute alispecajn planlingvojn (Couturat kaj Leau 1903, 143–152; Blanke 1985, 211–212).<sup>38</sup>

La demandon, ĉu Volapük funkciis en vera komunikado, la interlingvistoj jesas sen dubo. Pli detale, oni trovas la jenajn informojn:

- (1) *Volapük estis la unua planlingvo, kiu akiris ioman konatecon.*  
Tion konstatas Achmanova kaj Bokarev (1956, 65).
- (2) *Pri Volapük dum certa tempo regis vasta intereso.*  
Tion konstatas Monnerot-Dumaine (1960, 90), Back (1996, 884) kaj aliaj.
- (3) *Volapük estis la unua planlingvo, kiu fakte funkciis.*  
Tion konstatas inter aliaj Guérard (1922, 96), Drezen (1928/1931, 103),<sup>39</sup> Rónai (1969, 42), Forster (1982, 45), Blanke (1985, 205), Duli-

36 *Volapük*: Pri la lingvosistemo informas unuavice: Schleyer (1880). Duavice: Couturat kaj Leau (1903, 129–141), Manders (1947), Blanke (1985, 204–218, 2004, 2006).

37 *Disvastiĝo*: Pri la ekstereŭropa disvastiĝo de Volapük mi konkludas el la aperlokoj de la revuoj. Blanke (1985, 213) notas 123 volapukajn revuojn, el kiuj aperis en Eŭropo 104, en Ameriko 13, en Azio 5 kaj en Aŭstralio 1 kaj el kiuj 84 estis verkitaj plene en Volapük.

38 *Disfalo de la volapuka movado*: Ĉi tiu alineo tre koncizigas la raportojn el multaj fontoj: Couturat kaj Leau (1903, 141–163), Monnerot-Dumaine 1960, 88–90), Schmidt (1996), Forster (1982, 45–48), Blanke (1985, 210–218), Tresoldi (2011), Hauptenthal (2012), Garvía (2015, 34–56), Barandovská-Frank (2020, 127–138) kaj aliaj.

39 *Drezen*: La libro de Drezen aperis ekde 1911 plurfoje en la rusa kaj en Esperanto en diversaj, parte tradukitaj kaj parte ampleksigitaj kaj reviziitaj versioj (v.a. Blanke 2000, 25 n. 15). Mi uzas la 2-an esperantan eldonon (Drezen 1928/1931).

čenko (1990, 98) kaj en iom vualita aludo ankaŭ Meillet (1918, 319). Drezen kaj Duličenko eĉ pli gravigas la unuaecon de Volapük precizigante, ke per tiu unuafoja funkciado Volapük pruvis, ke entute eblas, ke planlingvo funkcias.

- (4) *Volapük havis grandan nombron da uzantoj.*  
Laŭ Barandovská-Frank (2020, 127) Volapük estis normale funkcianta planlingvo. Laŭ Blanke ĝi funkciis “in gewissem Maße” (certagrade) (Blanke 1985, 205, 2004, 1563).
- (5) *Volapük estis la unua planlingvo, kiu estis grandskale uzata.*  
Tion konstatas Manders (1947, 44).
- (6) *Volapük havis movadon.*  
Tion notas inter aliaj Manders (1947, 90–92), Garvía (2019, 341) kaj Barandovská-Frank (2020, 128–134). Pri la nombroj de parolantoj, kluboj, revuoj ktp. informas Couturat kaj Leau (1903, 142), Manders (1947, 90–91) kaj Schmidt (1996).<sup>40</sup> La movado de Volapük kulminis en 1888/1889 kaj post tiuj jaroj rapide malkreskis (Couturat kaj Leau 1903, 142; Manders 1947, 90; Schmidt 1996, 16), kun iometa reviviĝo post reformo de la lingvo fare de Arie de Jong en 1930 (Manders 1947, 92 n.1; Schmidt 1996, 2).
- (7) *La movado de Volapük estis la unua socia movado por planlingvo.*  
Tion konstatas Schmidt (1996, 1, 4). Ĉar ni ĉi tie klopodas spuri la faktan uzon, pli helpa por ni estas la vortumo de Barandovská-Frank (2020, 129), kiu skribas, ke la anaro de Volapük estis “la unua socia movado bazita sur *uzado* de planlingvo” (mia emfazo).

La faktan funkciadon de Volapük en internacia skriba komunikado grandskale montras la multnombraj revuoj kaj la korespondado inter la lingvanoj. Kiel apartan pruvilon de la fakta funkciado en parola komunikado oni ofte mencias ĝiajn kongresojn. Estis entute tri. La unua kongreso estis aranĝita en 1884 en Friedrichshafen (Germanio), proksime al la loĝloko de Schleyer. Laŭ la raportoj ĝi okazis grandparte en la germana (Blanke 1985, 210; Schmidt 1996, 8; Barandovská-Frank 2020, 129–130). La duan kongreson en 1887 en Munkeno oni unuflanke priskribas kiel vere internacian notante, ke tie Volapük estis la oficiala lingvo (Barandovská-Frank 2020, 130), sed

40 *Schmidt*: La publikaĵo de Schmidt (1996) estas faksimilo de germanlingva manuskripto de 1963, mallerte tajpita kun manskribaj aldonaĵoj kaj korektaĵoj. Ĝi spegulas ampleksan konon de la faktoj, sed prezentas ilin ne en maniero de hodiaŭaj sciencaj studoj, kiuj motivas siajn faktoprezentojn per referencoj al fontoj. La teksto bezonus zorgan redaktadon. Ekzistas 2-a eldono de 1998, laŭ mia scio identa kun tiu de 1986. La eldonanto Hauptenthal anoncis la intencon publikigi redaktitan kaj komentitan version, sed laŭ mia scio tiu plano ne realiĝis. Estis publikigitaj volapuka versio en 1964 kaj esperanta en 1998.

aliflanke konstatante, ke la kongresanoj plejparte interparolis en la germana (Blanke 1985, 210). La tria kongreso en 1889 en Parizo laŭ la raportoj uzis kiel kongreslingvon nur Volapukon. La tria kongreso jam signis la kverelojn kaj la splitiĝon de la movado, tiel ke pliaj kongresoj ne okazis.

Koncerne parolan komunikadon la plej grava pruvejo supozeble estas la tria kongreso. Tial indas studi la informojn pri ĝi iom pli detale. Inter la multaj aŭtoroj raportantaj, ke en tiu kongreso oni komunikis en Volapük, estas Couturat kaj Leau (1903, 143), Clark (1907, 9), Manders (1947, 91), Schmidt (1996, 20), Svadost (1968, 100) kaj Blanke (1985, 210). Aldone Garvía (2015, 47) precizigas, ke iuj kongresanoj ja uzis ankaŭ aliajn lingvojn, sed ke oni interpretis tiujn en Volapukon. Laŭ la raportoj de partoprenintoj la parola komunikado tute bone funkciis.<sup>41</sup> Blanke (1985, 210) tamen notas, ke per la intensa uzado ankaŭ evidentiĝis la fonetikaj mankoj de la lingvo (v.a. Blanke 2000, 67). Kontraŭe Jespersen (1928, 406) kiel fonetikisto konstatas, ke la kongresoj kaj renkontiĝoj de volapukistoj, esperantistoj kaj idistoj pruvigis, ke ĉia skeptikeco koncerne la prononcon de iliaj lingvoj estas senbazaj.<sup>42</sup>

Mi konkludas, ke Volapük funkciis en fakta komunikado, inter multaj homoj de multaj malsamaj denaskaj lingvoj en kaj ekster Eŭropo.

## 4 Kiu la unua?

Kiu do estis la unua funkcianta planlingvo? Estus bele, se ni povus nun resumi la supraĵajn prezentadojn de la tri lingvoj, rekonstati, kiuj aŭtoroj kun kiuj fontoj aŭ per kiuj argumentoj konkludas, ke la koncerna lingvo estis la unua funkcianta, por fine provi taksu kiu pravus. Tamen tiel facile ne estas. La bildon komplikas la fakto, ke iuj aŭtoroj parolas pri funkciado, aliaj pri uzo, iuj pri parolantoj, aliaj pri konateco kaj iuj pri movado. Alivorte, la kriterioj de la diversaj aŭtoroj ne estas identaj.

41 *Fontoj*: Neniu el la citiaj interlingvistoj ĉeestis la kongreson, sed ili ne indikas siajn fontojn. Tial estas aparte bone, ke Roberto Garvía bonvolis doni al mi la unuavicaĵajn fontojn, kiujn li konsultis pri la parola funkciado de Volapük dum la tria kongreso: Champ-Rigot (1889), Sprague (1889, 40–41) kaj Ugarte (1890). Ĉiuj tri aŭtoroj mem partoprenis la kongreson kaj emfazas, ke por la plej multaj kongresanoj estis la unua okazo uzi Volapukon en spontanea parola komunikado, kio laŭ ili post iom da kutimiĝo agrable funkciis. Champ-Rigot donas la oficialan protokolon de la kongreso. En ĝi li mencias la anoncon de la prezidanto pri la interpretado al Volapük por kongresanoj parolantaj en alia lingvo, sed li ne raportas, ĉu iuj fakte uzis tiun oferton. La aliaj du aŭtoroj raportas al siaj hejmlandaj legantoj pri siaj kongresaj travivaĵoj kaj mencias la parolan komunikadon. Oni frandu ankaŭ la bankedon ĉe Champ-Rigot kaj Ugarte.

42 *Jespersen*: Koncerne parolan komunikadon Jespersen (1928/2010, 406) rakontas pri okazo en 1887, kiam du personoj en londona filologia societo konversaciis en Volapük, kio impresis lin kaj konvinkis lin pri planlingvoj. Elena Simonato Kokochkina (2004, 47) raportas, ke Jespersen havis tiun konvinkan travivaĵon partoprenante volapukistan kongreson, sed en retletero al mi de 08.01.2023 ŝi skribas, ke laŭ sia nuna supozo ŝi eraris pri la kongrespartopreno kaj ke ŝia fonto tre verŝajne estis la rakonto pri la londona konversacio.



Kiel analizi tiun situacion? La resuma diagnozo el la supraj prezentoj estas la jena: En Solresol oni komunikis en prezentadaj kaj eksperimentaj situacioj kaj supozeble ankaŭ en unu-du kursoj, tre verŝajne ĉiufoje inter samlingvanoj. En la universala lingvo de Sotos Ochando oni komunikis en kelkaj kursoj, eble sen plena rego de la lingvo, kaj krome eble en prezentadaj situacioj, ankaŭ ĉi-kaze supozeble inter samlingvanoj. En Volapük oni komunikis skribe kaj parole, pri multaj temoj, inter supozeble centmiloj da malsamlingvanoj. Sekve la demandon, kiu la unua estis funkcia, ni ne povas decidi jes aŭ ne, sed bezonas *gradan* mezurilon de komunika funkciado.

Tia gradmezurilo de komunika funkciado fakte ekzistas: la socilingvistika-pragmatika skalo de Blanke.<sup>43</sup> Ĝi mezuras la faktan praktikan uzon de planlingvo en 28 ŝtupoj. Metante la proponitajn planlingvojn sur la skalon, Blanke konstatas, ke ili ariĝas en tri grupoj: la *planlingvoprojektoj* apenaŭ progresintaj sur la skalo, la *semiplanlingvoj* progresintaj ĝis ie en la mezo de la skalo kaj la (proprasencaj) *planlingvoj* atingintaj la pintan ŝtupon (Blanke 2000, 71). Ankaŭ tiu tridivido estas bone konata, samkiel la diagnozo de Blanke, laŭ kiu ĝis nun nur Esperanto atingis la statuson de planlingvo. La terminoj estas vaste akceptitaj, sed samkiel aliaj interlingvistoj ankaŭ mi ĉi tie en kontekstoj, en kiuj mi ne intencas emfazi la diferencojn inter la tri grupoj, uzas la vorton *planlingvo* por ĉiuj proponitaj planlingvosistemoj sendistinge.

Aplikante la skalon de Blanke, Garvía skribas:

In Detlev Blanke's typology, Sotos Ochando's language reached the intermediate stages that mark "semi-languages" such as Volapük, Latino sine flexione, Ido, Occidental-Interlingue, Basic English, and Interlingua (Garvía 2019, 327).

(En la tipologio de Detlev Blanke, la lingvo de Sotos Ochando atingis la mezajn ŝtupojn, kiuj karakterizas "semi-lingvojn" kiel Volapük, Latino sine flexione, Ido, Occidental-Interlingue, Basic English kaj Interlingua.)

Tiel Garvía diagnozas por la lingvo de Sotos Ochando la semiplanlingvan statuson. Bedaŭrinde li ne detale analizas, kiujn ŝtupojn laŭ lia scio la lingvo atingis. Blanke klasifikas kiel semiplanlingvojn tiujn, kiujn Garvía citas, eĉ se laŭ Blanke Basic English kaj Interlingua nur *eble* apartenas al tiu grupo. Blanke konstatas, ke la nomitaj semiplanlingvoj atingis la ŝtupojn 15 aŭ 16,

43 *Skalo de Blanke*: La aŭtoro prezentas la skalon plurfoje en ĉiam pli detalaj versioj. En la ĉefverko de Blanke ĝi havas 18 ŝtupojn. En la presita libro ĝi troviĝas sur elfaldebla paĝo sekvanta la paĝon 112 (Blanke 1985, 112 tab. 2), en la reta versio ĝi aperas sur paĝo 410 (Blanke 1985/2020, 410 tab. 2). En la plej lastatempa versio la skalo havas 28 ŝtupojn (Blanke 2000, 64–71).

Ido eĉ 18 aŭ 19 de la 28-ŝtupa skalo (Blanke 2000, 73). Se Garvía pravas koncerne la lingvon de Sotos Ochando, tio estus por la interlingvistiko nova kaj ĝis nun ne atentita fakto. Indas do zorge konsideri ĝin.

Por konfirmi aŭ malkonfirmi la semiplanlingvan statuson de la tri studataj planlingvoj, mi jen analizas ilin laŭ la skalo de Blanke. Necesas tamen unue pripensi, kiel ekzakte apliki la skalon. Suchowolec (2018, 89) kritikas la skalon de Blanke notante, ke ĝi estas konstruita laŭ la evoluŝtupoj de Esperanto, tiel ke ne estas mirinde, ke laŭ tia skalo Esperanto montriĝas esti la plej sukcesa inter la planlingvoj. Mi ne plene konsentas kun Suchowolec, ĉar sendepende de la elekto de skalo evidentas ke Esperanto estas la plej progresinta planlingvo, tiel ke estas prudente konstrui evoluskalon laŭ ĝia progresvojo, precipe en la plej altaj ŝtupoj ne atingitaj de aliaj planlingvo-projektoj. La kritiko de Suchowolec tamen instigas zorge atenti, ke oni ne premisu, ke ĉiu planlingvo evoluu laŭ la 28 ŝtupoj ĝuste en la sama vicordo, kiun sekvis Esperanto. Kaj oni pretu al la skalo aldoni pliajn, supozeble interajn ŝtupojn por lingvoj irantaj aliajn evolupadojn. Sekve de ĉi tiu konsidero mi elektas alian prezentformon ol Blanke. En sia ĉefverko Blanke desegnas tabelon, kiu montras en la supra linio la (tiam 18) ŝtupojn kaj en la maldekstra kolumno kelkajn elektitajn planlingvoprojektojn, semiplanlingvojn kaj la planlingvon Esperanto (Blanke 1985, 112 tab. 2). La evoluon ĝisdate trairitan de ĉiu el ili Blanke bildigas per sago komenciĝanta maldekstre ĉe ŝtupo 1 kaj etendiĝanta malpli aŭ pli longe dekstren. La bildo de sago sugestas, ke lingvo, atinginta certan ŝtupon, nepre devas esti trairinta ĉiujn pli malaltajn ŝtupojn. Sed ĉar ne ĉiuj lingvoj sekvas la padon de Esperanto, tiel ne estas. Tio, kion ni povas lerni el la kritiko de Suchowolec do ne estas ia maltaŭgeco de la ŝtuposkalo mem, sed de la seninterrompaj sagoj. Sekve, anstataŭ sagoj mi jen proponas simplan tekstotabelon, en kies fakojn mi enskribas la trovitajn informojn pri plenumo, neplenumo aŭ iel parta plenumo de la koncerna kriterio. Mia tabelo sendube estas malpli okulfrapa ol tiu de Blanke, sed ĝi havas la avantaĝon permesi pli detalezakte registri, ke eble iu lingvo ne plenumas la kriterion de certa ŝtupo sed tamen ja tiun de ŝtupo pli alta.

Por la analizo de la tri studataj planlingvoj mi montras en Tabelo 1 la analizon laŭ la skalo de Blanke.<sup>44</sup> Oni vidas en la tabelo, ke pri pluraj el la kriterioj ne eblas doni klare jesan aŭ nean respondon, ĉar la fontoj donas nur malprecizan informon aŭ ĉar la faktoj nur iugrade plenumas tiun aŭ alian kriterion. La interlingvistojn, kiuj eble havas aliron al pli enhavoriĉaj fontoj aŭ kiuj pli profunde ol mi komprenas la fontojn, mi tial ŝatus kore inviti diskuti, korekti kaj kompletigi miajn trovaĵojn.

44 *Ŝtupoj*: Mi uzas la 28-ŝtupan skalon. La nomojn de la ŝtupoj mi tradukas laŭ tiu publikaĵo el la germana. La priskribojn mi resumas laŭ la germana teksto de Blanke.

ŝtupo	priskribo	Solresol	Sotos Ochando	Volapük
1	manuskripto, nepublikigita	jes	jes	jes
2	publikigo, en diversaj statoj de ellaboro	jes	jes	jes
3	instruiloj: gramatikoj, vortlistoj, tekstoj	jes	jes	jes
4	varbado	jes, per la Societo	jes, per la Societo	jes
5	revuoj: aperigo de malgranda internacia revuo en la lingvo aŭ pri ĝi	ne	en: ne; pri: jes	jes, tre multaj
6	korespondado	ne raportita	ne raportita	jes
7	tradukoj kaj originalaj tekstoj	ne raportita	ne raportita	jes, iom da tradukita beletro, iomete da originala
8	parola komunikado	ne raportita, eble en eksperimentoj	ne raportita	
9	organizaĵoj: fondo de, komence malgrandaj, organizaĵoj de adeptoj de la lingvo	jes, unusola	jes, unusola	jes, multaj
10	kreskanta verkado: tradukoj kaj originalaj tekstoj	ne	ne raportita	jes
11	(privataj) kursoj	jes, unu	jes, kelkaj	jes
12	malgranda lingvokomunumo	ne, tamen lernantoj	apenaŭ	jes
13	diskutoj pri lingvaj temoj, en revuoj ktp.	ne*	ne*	jes
14	faka komunikado: diversiĝo de la lingvokomunumo laŭ fakoj aŭ profesioj, ekesto de faka lingvaĵo kaj terminoj	ne	ne	
15	renkontiĝoj, konferencoj, kongresoj	ne	ne	jes
16	strukturiĝo de la lingvokomunumo: organizaĵoj sur loka, landa, monda niveloj; organizo de kursoj por kursestroj ktp.	ne	ne	jes
17	estiĝo, stabiliĝo kaj fikso de normo: kvanta kaj kvalita kresko de lingvouzo, verkoj fiksantaj lingvan normon	ne	ne	ne vere; malhelpis la stiremo de Schleyer
18	grandaj kongresoj	ne	ne	jes
19	tutmonda disvastiĝo	ne	ne	jes
20	interlingvistiko: scienca analizo de la lingvo, studentaj kaj doktoraj disertaĵoj ktp.	ne*	juĝo de la pariza Societo*	jes
21	heŭristika efiko: oni rekonas la sciencan valoron de planlingvoj, tiel ke planlingvaj ideoj povas influi aliajn disciplinojn	ne	ne	jes
22	ekstera uzado: pro la praktika utileco ekstermovadaj instancoj uzas la lingvon	nur eksperimente	ne	jes
23	ŝtata instruado: en lernejoj kaj universitatoj	ne	jes, kelkaj kursoj	jes, mallonga-tempe
24	elektronikaj medioj	ne*	ne*	ne*
25	socia diferenciĝo de la lingvokomunumo: laŭ ideologio/religio, politikaj direktoj, aĝo	ne	ne	ekestis, ne disvolviĝis
26	familia lingvo: ekestas plurnaciaj familioj kun denaskaj planlingvanoj	ne	ne	tre malmultaj
27	originala kulturo: la lingvokomunumo havas proprajn historion, tradiciojn, idealojn, mitoj, identigilojn, literaturon, teatarton; estiĝas specifa kulturo	ne	ne	ne
28	lingvoevoluo: diferenciĝo de la lingvaj esprimiloj, frazeologiaĵoj klarigeblaj nur el la historio de la komunumo ktp., nestirita lingvoevoluo, normigo per internacia uzo	ne	ne	ne

Tabelo 1: Solresol, la lingvo de Sotos Ochando kaj Volapük en la 28-ŝtupa skalo de Blanke (\* = vidu la ĉi-sekvajn rimarkojn)

Por la analizo en Tabelo 1 mi ne donas fontindikojn por ĉiu faketo, sed ĉerpas el la fontoj menciitaj en sekcio 3. Tamen indas fari kelkajn rimarkojn pri la faktoj signitaj per asterisko.

Solresol, ŝtupo 20: Laŭ la troveblaj fontoj la francaj akademioj kaj kleraj societoj donis laŭdajn juĝojn, sed ne publikigis detalajn sciencajn analizojn de Solresol aŭ de ĝia uzado.

Sotos Ochando, ŝtupo 13: La kriterio de Blanke laŭ mia kompreno temas pri diskutado pri trajtoj, evoluigoj, plibonigoj, problemoj ktp. de la koncerna planlingvo. Garvía (2019, 338) atentigas, ke ja okazis interesa diskutado de lingvaj problemoj en la lekciaro de Mata (1862, precipe 18–23, 173–185). Mi tamen ne jesas ĉi tiun ŝtupon pro du kaŭzoj. Unue, Mata ne diskutas, sed, tute laŭ la kutimo de akademiaj lekcioj, monologas, do ne diskutas, ne interagas kun aliaj. Due kaj pli grave, ĉar la rezonado de Mata ne detale traktas la ecojn aŭ la sistemon de la lingvo de Sotos Ochando, eĉ ne tie, kie en la historio de la universalaj lingvoj li atingas tiun de Sotos Ochando (Mata 1862, 318–320). Se mi ĝuste komprenas lian libron, la rezonado de Mata en granda parto de la lekciaro temas tutĝenerale pri la homa lingvo, pri universala gramatiko kaj pri la universalaj leĝoj de la homa pensado. Krome Mata parolas (por esprimi tion en nuntempaj interlingvistikaj kategorioj) pri la nekonscia evoluo de etnaj lingvoj kaj la konscia, stira evoluigo de planlingvo, kaj ĉi-rilate pri la demando, ĉu entute eblas apriora lingvo. La ideoj de Mata ŝajnas al mi tre interesaj kaj pripensindaj – sed ili ne estas tio, pri kio temas la kriterio de Blanke.

Sotos Ochando, ŝtupo 20: La pariza Societo diskutas kaj analizas la lingvon de Sotos Ochando (Henricy 1858b, 152–169, 1859a, 244, 1859b, 294; simile Moigno 1859). La konsulteblaj fontoj donas la impreson, ke la Societo aŭ ĝia Komitato pri la universala lingvo ne konsistis el universitataj aŭ similaj sciencistoj, sed ĉefe el kleraj burĝoj. Pri ĝia laboro vidu Schubert (2018a,b); pri la fono kaj kvalifikoj de la komitatanoj iomete legeblas ĉe Décimo (2012, 2014, 199–331). Tamen oni povas akcepti ĉi tiun trakton de la lingvo almenaŭ kiel burĝonon de interlingvistika analizado.

Volapük, ŝtupo 21: Manders (1950, 14) rilatigas la komencon de la interlingvistiko al la estiĝo de adeptaro kaj la ekfunkciado de Volapük kaj Esperanto. Blanke (1985, 205) atentigas pri la grava influo de Volapük al la interlingvistiko kaj la lingvistika kompreno de planlingvoj.

Ĉiuj, ŝtupo 24: Elektronikajn mediojn oni por neniu el la tri lingvoj uzis dum la aktiva fazo, ĉar ili tiam ne ekzistis. Hodiaŭ interlingvistoj kaj entuziasmoj ja uzas ilin, sed tio ne plu estas ŝtupo en la evoluo de la lingvo sed plejparte nur postokaza observado kaj ekspoziciado.

Juĝante laŭ la diagnozoj montrataj en Tabelo 1, mi opinias, ke la tezo de Garvía, laŭ kiu la lingvo de Sotos Ochando atingis la statuson de semiplanlingvo, de la troveblaj faktoj ne estas pravigita. Same Solresol ne progresis sufiĉe por aliĝi al la semiplanlingvoj.

Tiuj rezultoj tamen ankoraŭ ne respondas la demandon, ĉu Solresol aŭ la lingvo de Sotos Ochando antaŭ Volapük funkciis en fakta komunikado. La rezultoj montras ion alian, nome ke la demando pri komunika funkciado ne taŭgas por jesneaj respondoj. Ĉu en Solresol oni komunikis? Laŭ la raportoj jes, sed mi ne trovis raportojn pri komunikado ekster kursaj, prezentadaj aŭ eksperimentaj situacioj. Se tio estas ĝusta, do oni ne uzis la lingvon por ia fakta komunika bezono, sed nur por montri la eblecon komuniki en la lingvo. Ĉu oni komunikis en la lingvo de Sotos Ochando? Jes, sed laŭ la troveblaj raportoj nur en kursaj kaj eble en prezentadaj situacioj. Se tio estas ĝusta, ankaŭ en ĉi tiu lingvo oni komunikis nur por montri la eblecon komuniki en ĝi.

Ĉu do Solresol kaj la lingvo de Sotos Ochando funkciis? La respondo estas malklara “iomete”. Ĉu pro tio oni rajtas konstati, ke ili (aŭ unu el ili) estis funkciaj planlingvoj? Mi opinias, ke ne havas sencon diskuti, ĉu “iomete” estas jes aŭ ne. Por ĉi tiu tipo de demando ĝuste la skalo de Blanke estas tute taŭga instrumento. Ĝi montras per konkretaj, kontroleblaj kriterioj, ke la vojo de projekto al lingvo estas grada, iompostioma. La analizo do montras, ke la demando ne estu ĉu aŭ ne iu lingvo funkciis, sed ke pli sencohave estas demandi, *kiugrade* kaj eble *kiumaniere* ĝi funkciis. Fakte la cititaj kaj menciitaj konstatoj de la diversaj interlingvistoj ofte enhavas vortumojn kiel “uzita en iom pli granda skalo” aŭ “uzita certgrade” kaj simile.

La komunika funkciado de Volapük estis tiom pli grandskala, pli multtema, pli multlanda ol la modestaj burĝonadoj de Solresol kaj la lingvo de Sotos Ochando, ke ni laŭ mia juĝo tute pravas lasante al Volapük la statuson de la unua komunike funkcia planlingvo. Sed donante al ĝi tiun etiketon ni konsciu, ke la vojo de lingvoplano al planlingvo estas grada, multŝtupa, ofte nereкта. Kaj kompreneble ni hodiaŭ multe pli ol la deknaŭjarcentanoj scias, ke la evoluo de lingvo dependas ne nur de gramatikaj kaj vortaraj trajtoj, sed grandparte de sociaj kaj interhomaj faktoroj. Garvía (2019, 326) notas, ke por la adeptoj de la lingvo de Sotos Ochando estis pli facile arigi movadon, ĉar en ilia tempo la ideo de internacia planlingvo estis freŝa kaj unika, dum fine de la jarcento jam pluraj planlingvoj konkuris. En tio li pravas; lia rezonado tamen ankaŭ ilustras la trovaĵon de nia nuna studo: La evoluo de planlingvo estas socia afero, kaj sekve kiam la unuaj ekpaŝoj en la direkto de fakta uzado estis iritaj de Solresol kaj de la lingvo de Sotos Ochando, tiam ili preparis la socian akcepton kaj la publikan percepton de planlingvoj por postaj projektoj, kies agantoj lernis de ili.

Tio estas la ĉefa trovaĵo de ĉi tiu studo: La planlingvoj kaj iliaj movadoj ne estas sendependaj projektoj, sed la pli frua projekto preparas la publikajn atenton kaj opinion por si, sed samtempe por la postaj projektoj. La ĝenerala socia kaj idea etoso sendube ankaŭ kontribuas. Tiel la pli sukcesaj planlingvoj staras sur la ŝultroj de siaj antaŭuloj.

## Dankoj

Mi sincere dankas al Roberto Garvía, kiu afable disponigis al mi kopiojn el la revuo *Boletín de la Sociedad de lengua universal*, diskutis kun mi pri Sotos Ochando kaj lia lingvo, dividis kun mi siajn esplortrovaĵojn rilate Volapukon kaj krome bonvole korektis aron da eraroj en malneta versio de ĉi tiu artikolo. Mi krome dankas al Elena Simonato Kokochkina pro diskuto pri Jespersen kaj al Guilherme Fians pro korektoj kaj precizigoj. Ne kulpigu ilin pro la restantaj eraroj.

## Bibliografio

Ĉiuj retadreso estis kontrolitaj la 11.01.2023. Por retaj publikajoj kun longega aŭ nekonstanta retadreso estas indikita la retadreso de supera paĝo, el kiu eblas serĉi la koncernan publikajon.

- Achmanova, Ol'ga Sergeevna kaj Evgenij Alekseeviĉ Bokarev. 1956. "Meždunarodnyj vspomogatel'nyj jazyk kak lingvistiĉeskaja problema." *Vo-prosy jazykoznanija* 5 (6): 65-78.
- Alameda, Mariano. 1862. "Lista de los señores que componen la Sociedad de la lengua universal." *Boletín de la Sociedad de lengua universal* 6: 189-192.
- Arndt, Hans Werner. 1967. "Die Entwicklungsstufen von Leibniz' Begriff einer Lingua Universalis." En *Das Problem der Sprache*, redaktis Hans-Georg Gadamer, 71-79. München: Fink.
- Astori, Davide. 2011. "Il Solresol fra musica, letteratura e linguistica." *La Torre di Babele. Rivista di letteratura e linguistica* 7: 153-167.
- Auroux, Sylvain. 1983. "La première Société de Linguistique - Paris 1837?" *Historiographia Linguistica* X (3): 241-65.
- Back, Otto. 1996. "Plansprachen." En *Kontaktlinguistik / Contact Linguistics / Linguistique de contact*. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 12.1.), redaktis Hans Goebel, Peter H. Nelde, Zdeněk Starý kaj Wolfgang Wölck, 881-887. Berlin kaj New York: de Gruyter.
- Baquero Almansa, Andrés. 1884. *Hijos Ilustres de la Provincia de Albacete*. Madrid: Perez Dubrull

- Barandovská-Frank, Věra. 2020. *Interlingvistiko: enkonduko en la scienco pri planlingvoj*. Poznań: Wydawnictwo Rys kaj Uniwersytet im. Adama Mickiewicza.  
[http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Barandovska\\_Interlingvistiko\\_enkonduko.pdf](http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/Barandovska_Interlingvistiko_enkonduko.pdf)
- Bausani, Alessandro. 1974. *Le lingue inventate: Linguaggi artificiali, linguaggi segreti, linguaggi universali*. Roma: Ubaldini – tradukis Gustav Glaesser: Alessandro Bausani. 1970. *Geheim- und Universalsprachen*. (Sprache und Literatur 57.) Stuttgart k.a.: Kohlhammer.
- Biblioteca Nacional de España. 2023a. Boletín de la Sociedad de Lengua Universal [Texto impreso]. [Katalogero.] –  
<http://catalogo.bne.es/uhtbin/cgisirsi/?ps=6sHeou45cn/BNMA-DRID/147281726/123>
- Biblioteca Nacional de España. 2023b. Proyecto de lengua universal [Texto impreso]. Sotos Ochando, Bonifacio 1785-1869. [Katalogero.] –  
<http://catalogo.bne.es/uhtbin/cgisirsi/?ps=x1S5s8HnW/BNMA-DRID/169210623/9>
- Biblioteca Nacional de España. 2023c. Sotos Ochando, Bonifacio (1785–1869). [Katalogero.] –  
<https://datos.bne.es/persona/XX1444501.html>
- Bibliothèque nationale de France. 2023a. Jean François Sudre (1787–1862). [Katalogero.] –  
[https://data.bnf.fr/fr/10537906/jean\\_francois\\_sudre/](https://data.bnf.fr/fr/10537906/jean_francois_sudre/)
- Bibliothèque nationale de France. 2023b. Kerckhoffs, August (1935–1903), Gajewski, Boleslas. [Katalogero.] – <https://catalogue.bnf.fr/ark:/12148/cb30678451s>
- Blanke, Detlev. 1985. *Internationale Plansprachen. Eine Einführung*. (Sammlung Akademie-Verlag 34 Sprache.) Berlin: Akademie-Verlag – reta versio 2020: <https://d-nb.info/1205666974/34>
- Blanke, Detlev. 2000. “Vom Entwurf zur Sprache.” En *Planned Languages: From Concept to Reality*, redaktis Klaus Schubert. Temnumero de *Interface* 15 [1]: 37–89 – denove: Detlev Blanke. 2001. “Vom Entwurf zur Sprache.” En *Planned Languages: From Concept to Reality*, redaktis Klaus Schubert, 37–89. Brussel: Hogeschool voor Wetenschap en Kunst. – <http://d-nb.info/1239423241/34> – reviziita versio: Detlev Blanke. 2006. “Vom Entwurf zur Sprache.” En Detlev Blanke. *Interlinguistische Beiträge*, redaktis Sabine Fiedler, 49–98 + ref. 339–390. Frankfurt am Main k.a.: Lang.
- Blanke, Detlev. 2004. “Plansprachen.” En *Morphologie / Morphology*, redaktis Geert Booij, Christian Lehmann, Joachim Mugdan, Stavros Skopeteas kun Wolfgang Kesselheim, 1563–1573. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft 17.2.) Berlin kaj New York: de Gruyter.

- Blanke, Detlev. 2006. "Zur Morphologie von Volapük, Esperanto und Interlingua – ein Vergleich." En Detlev Blanke. *Interlinguistische Beiträge*, redaktis Sabine Fiedler, 201–219 + ref. 339–390. Frankfurt am Main k.a.: Lang.
- Boletín. 1862. [Anonima sentitola noto.] *Boletín de la Sociedad de lengua universal* (9): 286–288.
- Calero Vaquera, María Luisa. 1993. "En torno a la lengua universal. La contribución de Bonifacio Sotos Ochando (1785–1869)." *Revista Española de Lingüística* 23 (2): 221–233 – <https://dialnet.unirioja.es/descarga/articulo/41291.pdf>
- Calero Vaquera, María Luisa. 1999. *Proyectos de lengua universal. La contribución española*. Córdoba: Publicaciones de la Universidad de Córdoba – <https://www.raco.cat/index.php/Elies/article/download/271560/359188>
- Calero Vaquera, María Luisa. 2020. "The contribution of women to the Spanish linguistic tradition. Four centuries of surviving words." En *Women in the History of Linguistics*, redaktis Wendy Ayres-Bennett, Helena Sanson, 121–144 + ref. 509–661. Oxford: Oxford University Press.
- Cano Calderón, Amelia. 1987. "Lope Gisbert y su Gramática de lengua universal." *Murgetana* 73: 91–104 – <https://dialnet.unirioja.es/descarga/articulo/2664764.pdf>
- Champ-Rigot, Paul. 1889. "Compte-rendu du 3<sup>e</sup> Congrès international des volapükistes tenu à Paris, du 19 au 21 août 1889." *Le Volapük* 4 (26): 353–368g – <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k6386850n/f1.item/f1n28.pdf>
- Clark, Walter John. 1907. *International Language. Past, Present, Future*. London: Dent. – <https://ia600200.us.archive.org/34/items/internationalan00claruoft/internationalan00claruoft.pdf>
- Codorníu, Ricardo. 1914. *D. Bonifacio Sotos Ochando, el Doctor Zamenhof y los idiomas de su invención. Datos bibliográficos relativos al proyecto de lengua universal de D. Bonifacio Sotos Ochando*. Murcia: Imp. Sucesores de Nogués. – <http://bdh-rd.bne.es/high.raw?id=0000242968&name=00000001.original.pdf>
- Couturat, Louis, kaj Léopold Leau. 1903. *Histoire de la langue universelle*. Paris: Hachette. – <http://data.onb.ac.at/dtl/2912337>
- Décimo, Marc. 2012. "À propos de l'aventure de La Tribune des Linguistes (1854-1860): utopie et dépassement." *Dossiers d'Histoire Épistémologie Langage* (5) – [https://shesl.org/wp-content/uploads/2021/04/decimo\\_2012.pdf](https://shesl.org/wp-content/uploads/2021/04/decimo_2012.pdf)



- Décimo, Marc. 2014. *Sciences et pataphysique*. [Dijon]: Les presses du réel.
- Drezen, Ārnest Karloviĉ. 1928. *Za vseobŝĉim jazykom (tri veka iskanij)*. Moskva/Leningrad: Gosudarstvennoe izdatel'stvo. – prilaborita traduko de N. Hohlov, N. Nekrasov: Ernest Drezen. 1931. *Historio de la mondolingvo*. 2-a eld. Leipzig: Ekrelo. – <http://data.onb.ac.at/dtl/8828906>
- Duliĉenko, Aleksandr Dmitrievič. 1990. *Meždunarodnye vspomogatel'nye jazyki*. Tallinn: Valgus. – [http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/29085/dulitsenko\\_mezdunarodnyje.pdf](http://dspace.ut.ee/bitstream/handle/10062/29085/dulitsenko_mezdunarodnyje.pdf)
- “Feuilleton.” 1848. *Allgemeine Musikalische Zeitung* (17) 26.04.1848: kolumno 286. – <https://books.google.com>
- Figuier, Louis. 1868. *Les merveilles de la science*. Vol. 2. Paris: Furne, Jouvet. – <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k24675w/f3.item/f1n708.pdf>
- Forster, Peter G. 1982. *The Esperanto Movement*. (Contributions to the Sociology of Language 32.) The Hague/Paris/New York: Mouton.
- Fuster Ruiz, Francisco. 1986. “Obras de Don Bonifacio Sotos Ochando (Investigación bibliográfica).” *Al-Basit: Revista de estudios albacetenses* 19: 149–187. – <https://dialnet.unirioja.es/descarga/articulo/1327699.pdf>
- Fuster Ruiz, Francisco. 1996. “Bonifacio Sotos Ochando, creador de una lengua universal.” En *La memoria fiel. Grandes personajes en la historia de Albacete*, 135–167. Albacete: Cultural Albacete. – <http://iealbacetenses.dipualba.es/high.raw?id=0000040210&name=00000001.original.pdf&attachment=0000040210.pdf>
- Gajewski, Boleslas. 1885. “Sur la langue universelle de Sudre.” *Bulletins de la Société d'Anthropologie de Paris* 8: 602–605, diskuto: 605–617. – <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k639201/f6.item/f1n827.pdf>
- Gajewski, Boleslas. 1902. *Grammaire du Solrésol ou Langue Universelle de François Sudre*. Paris – [https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/b/b9/Grammaire\\_du\\_Solresol.pdf](https://upload.wikimedia.org/wikipedia/commons/b/b9/Grammaire_du_Solresol.pdf)
- Garvía, Roberto. 2015. *Esperanto and Its Rivals. The Struggle for an International Language*. Philadelphia: University of Pennsylvania Press.
- Garvía, Roberto. 2019. “Sotos Ochando’s language movement.” *Language Problems and Language Planning* 43 (3): 325–344.
- Gisbert, Lope. 1861. “Boletín de la Sociedad de Lengua Universal. Programa.” [Depreso el *Boletín de la Sociedad de Lengua Universal* 1.] Madrid: Imprenta de el Clamor Público. – <https://books.google.com>
- Gisbert, Lope, kaj Pascasio Lorrio. 1862. *Manual de Lengua Universal ó sea ensayo de gramática, ejercicios prácticos de análisis, traducción interlineal y trozos en Lengua Universal para uso de los que se dedican á aprenderla*. Madrid: J. Martín Alegría – <https://bdh-rd.bne.es/pdf.raw?query=id:%220000087589>

- Gaudin, François. 2009. "Henricy Casimir." *Le Maitron, Dictionnaire biographique, Mouvement ouvrier, Mouvement social*. [Versio aktualigita en 2019.] – <https://maitron.fr/spip.php?article61619>
- Guadet, Joseph. 1864. "De la language musicale universelle de Sudre à propos des sourds-muets et des aveugles." *L'Instituteur des Aveugles* – depreso: <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k132604t/f1.item/f1n16.pdf>
- Guérard, Albert Léon. 1922. *A Short History of the International Language Movement*. New York: Boni and Liveright. – <http://www.autodidactproject.org/other/guerard1.pdf>
- Hauptenthal, Reinhard. 2012. "Johann Martin Schleyer (1831–1912) und seine Plansprache Volapük." En *Zwischen Utopie und Wirklichkeit. Konstruierte Sprachen für die globalisierte Welt*, redaktis Andrea Pia Kölbl kaj Jennifer Bretz, 63–84. (Bayerische Staatsbibliothek, Ausstellungskataloge 85.) München: Allitera.
- Henricy, Casimir. 1858a. "Société internationale de Linguistique. Premier rapport du Comité de la langue universelle." *La Tribune des Linguistes* 1: 17–39. – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Henricy, Casimir. 1858b. "Société internationale de Linguistique. Deuxième rapport du Comité de la langue universelle." *La Tribune des Linguistes* 1: 65–105 + 129–169. – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Henricy, Casimir. 1859a. "Des sujets principaux dont s'occupe la Tribune des Linguistes – Langue universelle – Réforme orthographique." *La Tribune des Linguistes* 1: 241–251. – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Henricy, Casimir. 1859b. "La langue universelle." *La Tribune des Linguistes* 1: 289–296 + 337–345 + 385–394 + 433–445 – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Henricy, Casimir. 1860. "La langue universelle. Réponse à M. Letellier (de Caen)." *La Tribune des Linguistes* 2: 106–115 – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583204>
- Jespersen, Otto. 1928. *An International Language*. London: George Allen & Unwin. – elтираĵo en Otto Jespersen. 1960. *Selected Writings of Otto Jespersen*. London: George Allen & Unwin. – elтираĵo denove en Otto Jes-

- persen. 2010. *Selected Writings of Otto Jespersen*. Abingdon: Routledge, 400–409.
- Kerckhoffs, Aug. 1886. *Cours complet de Volapük contenant des thèmes et des versions avec corrigés et un vocabulaire de 2,500 mots*. 3-a eld. Paris: Soudier. –  
<https://numelyo.bm-lyon.fr/download.php?fichier=1673197791BM-LBML00GOO0100137001105348416.pdf>
- Kocher, Philippe. 2022. *Dirigierende Maschinen*. Bielefeld: transcript.
- Krause, Bernd. 2018. “Verortung von Farben und Bildung von Farbwörtern in ausgewählten philosophischen Planspracheprojekten.” En *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2018*, redaktis Cyril Brosch kaj Sabine Fiedler, 79–103. Leipzig: Leipziger Universitätsverlag. –  
<http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2018/JGI2018.pdf>
- Large, Andrew. 1985. *The Artificial Language Movement*. Oxford kaj New York: Blackwell.
- Lázaro, Fernando. 1948. “El nuevo proyecto de una lengua universal.” *Arbor* 10 (30): 239–246. –  
<https://search.proquest.com/4a484568-ee17-824b-bdcb-70eb67a8f579>
- Letellier, Charles-Louis-Augustin. 1852. *Cours complet de langue universelle*. Vol. 1: *Grammaire*. Caen: Laporte. –  
<https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k6493788b/f1n438.pdf>
- Letellier, Charles-Louis-Augustin. 1859a. “Première lettre sur la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 446–53. –  
<https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Letellier, Charles-Louis-Augustin. 1859b. “Deuxième lettre sur la langue universelle.” *La Tribune des Linguistes* 1: 496–503. –  
<https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Lingvo Universala de Sotos Ochando. 2021. –  
<https://lengua-universal-de-sotos-ochando.mozello.es/hejmo/>
- Lorrio, Pascasio. 1861. “Extracto del informe que, acerca del Proyecto de lengua universal del Señor Don Bonifacio Sotos Ochando, dió la comision nombrada al efecto en la Sociedad Linguistica de Paris.” *Boletín de la Sociedad de lengua universal* 1: 29–30.
- Manders, Wilhelmus Johannes Arnoldus. 1947. *Vijf kunsttalen. Vergelijkend onderzoek naar de waarde van het Volapük, Esperanto, Ido, Occidental en Novial*. Purmerend: Muusses.

- Manders, Wilhelmus Johannes Arnoldus. 1950. *Interlingvistiko kaj esperantologio*. Purmerend: Muusses.
- Mas Galvañ, Cayetano. 1997. "Liberalismo y exilio en Francia: el caso de Bonifacio Sotos." En *Disidencias y exilios en la España moderna*, redaktis Antonio Mestre Sanchís kaj Enrique Giménez López. Alicante: Universidad de Alicante. –  
[https://digital.csic.es/bitstream/10261/89910/1/R.C.AEHM\\_Alicante\\_1996\\_2\\_p.801-815\\_Mas\\_Galva%C3%B1.pdf](https://digital.csic.es/bitstream/10261/89910/1/R.C.AEHM_Alicante_1996_2_p.801-815_Mas_Galva%C3%B1.pdf)
- Mata, Pedro. 1862. *Curso de lengua universal. Lecciones dadas en la Ateneo Científico y Literario de Madrid en 1861*. Madrid: Villaverde. –  
<https://books.google.com>
- Mateos y Sotos, Rafael. 1986. "Bonifacio Sotos Ochando (Ensayo biográfico)." *Al-Basit: Revista de estudios albacetenses* 19: 135–148. –  
<https://dialnet.unirioja.es/descarga/articulo/1327692.pdf>
- Meillet, Antoine. 1918. *Les langues dans l'Europe nouvelle*. Paris: Payot. –  
<https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k4329399/f3.item/f1n504.pdf>
- Moch, Gaston. 1897. "La question de la langue internationale et sa solution par l'Esperanto." *Revue Internationale de Sociologie* 5: 249–295. –  
<https://ia802706.us.archive.org/17/items/revueinternatio03statgoog/revueinternatio03statgoog.pdf>
- Moigno, F. 1859. "Appréciation du projet de langue universelle de M. Bonifacio Sotos Ochando par le journal scientifique *Cosmos*." *La Tribune des Linguistes* 1: 279–285. –  
<https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- Monnerot-Dumaine, Marcel. 1960. *Précis d'interlinguistique générale et spéciale*. Paris: Maloine.
- Mourelle-Lema, Manuel. 1968. *La teoría lingüística en la España del siglo XIX*. Madrid: Prensa Española.
- Neis, Cordula. 2009. "Universalsprache." En Gerda Haßler kaj Cordula Neis: *Lexikon sprachtheoretischer Grundbegriffe des 17. und 18. Jahrhunderts*, 790–836. Berlin kaj Boston: de Gruyter.
- Noordegraaf, J. 1988. "Universele taal of universele grammatica? J. M[.] Hoogvliet en het Volapük." *Voortgang* 9: 163–196. –  
[https://www.dbnl.org/tekst/\\_voo004198801\\_01/\\_voo004198801\\_01.pdf](https://www.dbnl.org/tekst/_voo004198801_01/_voo004198801_01.pdf)
- Ojo y Gómez, José del. 1860. *La lengua universal. Breves consideraciones sobre esta cuestión patriótica*. Madrid: Imprenta Galiano. –  
<https://oca.ucm.es/s/patrimonio/item/657960>
- Picht, Heribert. 1996. "Fachkommunikation – Fachsprache." En *Multilingualism in Specialist Communication / Multilingualisme dans la communi-*

- ation spécialisée / Mehrsprachigkeit in der Fachkommunikation*, redaktis Gerhard Budin, 27–45. Vienna: TermNet.
- “Plansprache.” 2022. *Wikipedia* [germana] – <https://de.wikipedia.org/wiki/Plansprache>
- Rij, Inge van. 2015. “‘A living, fleshy bond’: The electric telegraph, musical thought, and embodiment.” *19th-Century Music* 39 (2): 142–166.
- Rodríguez Ponce, María Isabel. 2020. “Las lenguas artificiales musicales.” En *En los límites del lenguaje: diseños artificiales y ficciones comunicativas*, redaktis Carmen Galán Rodríguez kaj María Luisa Calero Vaquera, 149–168. (Estudios de Lingüística del Español, 41.) – <https://bop.unibe.ch/index.php/elies/article/view/8525/11486>
- Rónai, Paulo. 1964. *Homens contra Babel: passado, presente e futuro das línguas artificiais*. Rio de Janeiro: Zahar. – pliampleksigita traduko de Herbert Caro: Paulo Rónai. 1969. *Der Kampf gegen Babel oder Das Abenteuer der Universalsprachen*. München: Ehrenwirth.
- Rose, Gilbert. 2013. “La téléphonie de Jean-François Sudre.” En *Mémoires de l’Académie nationale de Metz* 2013, 159–166. – [http://documents.irevues.inist.fr/bitstream/handle/2042/59872/ANM\\_2013\\_159-166.pdf](http://documents.irevues.inist.fr/bitstream/handle/2042/59872/ANM_2013_159-166.pdf)
- Sakaguchi, Alicja. 1998. *Interlinguistik. Gegenstand, Ziele, Aufgaben, Methoden*. (Duisburger Arbeiten zur Sprach- und Kulturwissenschaft 36.) Frankfurt am Main: Lang.
- Schleyer, Johann Martin. 1880. *Volapük. Die Weltsprache. Entwurf einer Universalsprache für alle Gebildete der ganzen Erde*. Sigmaringen: aŭtoro. – represo 1982, redaktis Reinhard Haupenthal. Hildesheim, Zürich kaj New York: Olms.
- [Schleyer, Julius, sub la pseŭdonimo] s. i. e. 1879. “Universalschrift und Universalsprache.” *Allgemeine Deutsche Lehrerzeitung* (35): 305–309. – <https://www.deutsche-digitale-bibliothek.de>
- Schmidt, Johann. 1964. *Jenotem valemapika “Volapük”*. Amsterdam-W.: Volapükagased. – germanlingva eldono: Johann Schmidt. 1986. *Geschichte der Universalsprache Volapük*. Saarbrücken: Iltis. – 2-a germanlingva eld. 1998. – tradukis Ph. Combot: Johann Schmidt. 1996. *Historio de la universala lingvo Volapuko*. Courgenard: La Blanchetière.
- Schubert, Klaus. 2007. *Wissen, Sprache, Medium, Arbeit*. (Forum für Fachsprachen-Forschung, 76.) Tübingen: Narr. – <http://d-nb.info/1045615382/34>
- Schubert, Klaus. 2015. “Word-formation and planned languages.” En *Word-formation*, redaktis Peter O. Müller, Ingeborg Ohnheiser, Susan Olsen kaj Franz Rainer, 2210–2225. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft, 40.3.) Berlin kaj Boston: De Gruyter Mouton.

- Schubert, Klaus. 2018a. "Apriorische und aposteriorische Plansprachen – eine Quellenrecherche." En *Jahrbuch der Gesellschaft für Interlinguistik 2018*, redaktis Cyril Brosch kaj Sabine Fiedler, 105–132. Leipzig: Universitätsverlag. – <http://www.interlinguistik-gil.de/wb/media/beihefte/JGI2018/JGI2018-Schubert.pdf> – traduko fare de la aŭtoro: Klaus Schubert. 2018b. Aprioraj kaj aposterioraj planlingvoj – esploro de la fontoj. – <https://d-nb.info/1172505233/34>
- Schubert, Klaus. aperos. "Language construction and specialised communication." *Specialized Communication*, redaktis Ruth Breeze, Jan Engberg kaj Thorsten Roelcke. (Handbücher zur Sprach- und Kommunikationswissenschaft.) Berlin: de Gruyter.
- Sidosi. 2021. A compilation of information about Solresol, the universal musical language. – <https://www.sidosi.org>
- Simonato Kokochkina, Elena. 2004. "Le raisonnement énergétique dans la conception des langues artificielles chez Otto Jespersen." *Cahiers Ferdinand de Saussure* (57): 45–55. – [https://www.cercleferdinanddesaussure.org/CFS/Volume\\_57\\_2005.pdf](https://www.cercleferdinanddesaussure.org/CFS/Volume_57_2005.pdf)
- "Solresol." 2022. *Wikipedia* [germana]. – <https://de.wikipedia.org/wiki/Solresol>
- "Solresolo." 2021. *Vikipedio* [Esperanto]. – <https://eo.wikipedia.org/wiki/Solresolo>
- [Sotos Ochando, Bonifacio]. 1845a. [Anonima sentitola artikolo.] *El Heraldo* (Edición de Madrid) 03.07.1845, p. 3. – <https://hemerotecadigital.bne.es>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1845b. "Proyecto de lengua universal. Artículo II (4)." *El Heraldo* (Edición de Madrid) 17.07.1845, p. 3. – <https://hemerotecadigital.bne.es>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1845c. "Sobre la lengua universal. Artículo III (4)." *El Heraldo* (Edición de Madrid) 02.08.1845, p. 3–4. – <https://hemerotecadigital.bne.es>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1845d. "Sobre la lengua universal. Artículo IV." *El Heraldo* (Edición de Madrid) 22.08.1845, p. 3–4. – <https://hemerotecadigital.bne.es>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1845e. "Sobre la lengua universal. Artículo 5.º." *El Heraldo* (Edición de Madrid) 27.08.1845, p. 3. – <https://hemerotecadigital.bne.es>
- Sotos [Ochando], Bonifacio. 1852. *Proyecto y ensayo de una lengua universal y filosófica*. 2-a eld. Madrid: Martín Alegría. – <https://books.google.com>

- Sotos Ochando, Bonifacio. 1855a. *Projet d'une langue universelle*, tradukis A. M. Touzé. Paris: Lecoffre. – <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k6508523m/f15.item/f1n311.pdf>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1855b. *Résumé analytique d'un projet de Langue universelle*, tradukis A. M. Touzé. Paris: Lecoffre. – <https://books.google.com>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1862. *Diccionario de Lengua Universal precedido del resumen de su gramática, y seguido de varios apéndices muy importantes*. Madrid: Imprenta de J. Martin Alegría. – <https://bdh-rd.bne.es/high.raw?id=0000107202&name=00000001.original.pdf>
- Sotos Ochando, Bonifacio. 1863. *Gramática de la lengua universal*. Madrid: Imprenta de J. Martin Alegría. – <https://bdh-rd.bne.es/high.raw?id=0000108094&name=00000001.original.pdf> – pli ampleksa versio: <https://books.google.com>
- Sprague, Charles E. 1889. "The Volapük Congress at Paris." *Volapük, Gasedil mulik püka bevünetik* 2 (2): 40–46. – <https://books.google.com>
- Strasser, Gerhard F. 1989. "Lingua realis, lingua universalis und lingua cryptologica: Analogiebildungen bei den Universalsprachen des 16. und 17. Jahrhunderts." *Berichte zur Wissenschaftsgeschichte* 12: 203–217.
- Stria, Ida. 2016. *Inventing Languages, Inventing Worlds. Towards a Linguistic Worldview for Artificial Languages*. (Dysertacje Wydziału Neofilologii UAM w Poznaniu, 29.) Poznań: Wydział Neofilologii UAM w Poznaniu. – [https://repozytorium.amu.edu.pl/bitstream/10593/17566/1/Stria\\_9788394760915.pdf](https://repozytorium.amu.edu.pl/bitstream/10593/17566/1/Stria_9788394760915.pdf)
- Suchowolec, Karolina. 2018. *Sprachlenkung – Aspekte einer übergreifenden Theorie*. (Sprachwissenschaft 38.) Berlin: Frank & Timme. – [https://www.frank-timme.de/de/programm/produkt/sprachlenkung-aspekte\\_einer\\_uebergreifenden\\_theorie](https://www.frank-timme.de/de/programm/produkt/sprachlenkung-aspekte_einer_uebergreifenden_theorie)
- Sudre, François. 1866. *Langue musicale universelle inventée par François Sudre, également inventeur de la téléphonie*. Paris: La veuve de l'auteur/Flaxland.
- Sudre, [Marie-]Joséphine. 1866. "Historique des travaux de François Sudre." En François Sudre: *Langue musicale universelle inventée par François Sudre, également inventeur de la téléphonie*. Paris: La veuve de l'auteur/Flaxland, V–XXIX.
- Sudre, Marie-Joséphine. 1883. *Théorie & pratique de la langue universelle, Inventée par Jean-François Sudre, également inventeur de la téléphonie*. Tours: Imprimerie Rouillé-Ladevèze. – <https://gallica.bnf.fr/ark:/12148/bpt6k132610n/f1n61.pdf>

- Svadost, Ērmar [pseŭdonimo de Nikolaj Pavloviĉ Istomin]. 1968. *Kak vzniknet vseobščij jazyk?* Moskva: Nauka. – [https://bookap.info/book/svadost\\_kak\\_voznik\\_vseobshchiy\\_yazyk\\_1968.pdf](https://bookap.info/book/svadost_kak_voznik_vseobshchiy_yazyk_1968.pdf)
- Tresoldi, Roberto. 2011. “L’influenza del Volapük di Schleyer su Zamenhof (1879–1887) / La influo de la lingvo Volapuko de Schleyer sur Zamenhof (1879–1887).” *In Koj Interlingvistikaj Kajeroj* 2 (2): 112–141. – <http://riviste.unimi.it/index.php/inkoj/article/view/1216/1428>
- La Tribune des Linguistes* 1. 1858–1859. – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583203>
- La Tribune des Linguistes* 2. 1859–1860. – <https://download.digitale-sammlungen.de/BOOKS/download.pl?id=bsb10583204>
- Ugarte, N. de. 1890. “El congreso de lengua internacional en Paris.” *Ateneo Caracense y Centro Volapükista Español* 10 (1): 8–12 + 10 (2): 18–22.
- Velarde Lombraña, Julián. 1987. “Proyectos de lengua universal ideados por españoles.” *Taula, Quaderns de Pensament* 7–8: 7–78. – <https://www.raco.cat/index.php/Taula/article/view-File/70591/89794>
- Verna Haize, Christine. 1999. “Un des précurseurs de la phonétique, D. Bonifacio Sotos Ochando.” En *Relaciones culturales entre España, Francia y otros países de lengua francesa*, 387–392. Cádiz: Universidad de Cádiz, Servicio de Publicaciones. – <https://dialnet.unirioja.es/descarga/articulo/2054447.pdf>
- Vinader y Doménech, Francisco. 1885. *Compendio de la lengua universal de Sotos Ochando simplificada considerablemente por Francisco Vinader y Doménech*. Madrid: Montoya [presejo]. – <http://bdh-rd.bne.es/high.raw?id=0000107320&name=00000001.original.pdf>
- Wüster, Eugen. 1931. *Internationale Sprachnormung in der Technik, besonders in der Elektrotechnik (Die internationale Sprachnormung und ihre Verallgemeinerung)*. 2-a eld. 1966. (Sprachforum, Beiheft 2.) Bonn: Bouvier.

## Pri la aŭtoro

Klaus Schubert estas emerita profesoro pri aplika lingvistiko en la universitato de Hildesheim (Germanio). Pli frue li laboris kiel socilingvisto, komputa lingvisto, projektestro kaj profesoro pri lingvoteknologio kaj teknika tradukado. Liaj esploraĵoj interkonsilas interlingvistikon, tradukologion kaj la teorion de faka komunikado.

Retpoŝto: [klaus.schubert@uni-hildesheim.de](mailto:klaus.schubert@uni-hildesheim.de)  
ORCID-numero: 0000-0002-2684-4303



## About the author

Klaus Schubert is emeritus professor of applied linguistics at the University of Hildesheim (Germany). He has previously held positions as a sociolinguist, a computational linguist, a project leader and a professor of language data processing and technical translation studies. His research interests include interlinguistics, translation studies and specialised communication studies.

## Über den Verfasser

Klaus Schubert ist Professor für Angewandte Sprachwissenschaft der Universität Hildesheim im Ruhestand. Er war zuvor als Soziolinguist, Computerlinguist, Projektleiter und als Professor für Sprachdatenverarbeitung und Technikübersetzen tätig. Zu seinen Forschungsinteressen zählen die Interlinguistik, die Translationswissenschaft und die Fachkommunikationswissenschaft.

### What was the first fully-functioning planned language?

**Abstract:** In interlinguistics it is generally agreed that Volapük was the first planned language to function in real communication. Recently, however, several authors have put forward the thesis that Sudre's Solresol or Sotos Ochando's universal language were functional at an earlier point in time. According to another thesis, Sotos Ochando's language has even achieved the status of a planned semi-language. The article briefly presents the three languages and investigates the question which one of them according to the available sources was the first functioning planned language. Through a more detailed analysis of the history of the two languages in question it is shown that the question is not of an absolute, but of a gradual nature. Applying Blanke's scale of the development of planned languages as a suitable yardstick for this type of slow and gradual developments, the article tries to detect for each step on the scale, whether or to what extent the relevant language has attained it. It turns out that it can be meaningful to use the scale in a way slightly different from Blanke's own. Further, it is argued that a certain success of one planned language prepares the ground for the social acceptance and the spreading of subsequent planned languages.

**Keywords:** Fully-functioning planned language; Planned language development; Solresol; Sudre; Sotos Ochando's Lengua Universal; Volapük.

### **Welches war die erste funktionierende Plansprache?**

**Zusammenfassung:** Als erste in realer Kommunikation funktionierende Plansprache wird in der Interlinguistik allgemein Volapük betrachtet. In letzter Zeit vertreten jedoch einige Autoren die These, das Solresol von Sudre oder die Universalsprache Sotos Ochandos hätten früher als Volapük kommunikativ funktioniert. Es gibt zudem die These, Sotos Ochandos Sprache habe sogar den Status einer Semiplansprache erreicht. Der Aufsatz stellt die drei Sprachen kurz vor und untersucht anhand der auffindbaren Quellen, welche von ihnen die erste funktionierende Plansprache war. Eine genauere Analyse der Geschichte der beiden fraglichen Plansprachen macht deutlich, dass die Frage nicht absoluter, sondern gradueller Natur ist. Als einen für derartige allmähliche Entwicklungen gut geeigneten Maßstab nutzt der Aufsatz Blankes Stufenskala und versucht, für jede einzelne Stufe zu ermitteln, ob und inwieweit die betreffende Sprache sie erreicht hat. Dabei zeigt sich, dass es sinnvoll ist, die Skala ein wenig anders als Blanke anzuwenden. Zugleich wird deutlich, dass ein gewisser Erfolg einer Plansprache den Boden bereitet für die soziale Akzeptanz und die Verbreitung späterer Plansprachen.

**Schlagworte:** funktionierende Plansprache; Sprachentwicklung bei Plansprachen; Solresol; Sudre; Universalsprache Sotos Ochandos; Volapük.